

La Espero

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

FROSTAVALLEN

1972

EL LA ENHAVO

Sveda Somera Semajno,
Frostavallen 59—65

57-a Universala Kongreso,
Portland 67

Impresoj pri la
Kongreslando 70

Junulara Konferenco pri
Eŭropa sekureco 73

Abono 20 sv. kr.

Poŝtgiro: SEF 20 12-3

5

1972

60-a jaro



Survoje de la nova hotelo kaj moderna prelegejo de Frostavallen. La prelegantoj kaj organizanto. De maldekste: S-ro J. Thierry, Francujo, D-ro J. C. Wells, Britujo D-ro W. Bormann, Germanujo, D-ro I. Lapenna, Britujo, kaj s-ro J. Strönne, Svedujo.

LA REDAKTORO:

La Espero ĉi-foje aperas malfrue. La kaŭzoj estas pluraj. La redaktoro malfrue revenis el Portland kaj Usono. Sed ankaŭ estas tiel, ke ni faris specialan numeron pri la du grandaj aranĝoj: Frostavallen kaj Portland, kaj ni deziris prezenti la plej bonajn artikolojn kaj la plej bonajn bildojn. Kaj speciale la plej bonajn bildojn ni nur malfrue ricevis.


Nu, jen tiu numero estas en viaj manoj. Certe vi trovos ankaŭ en ĝi grandajn mankojn. Tamen, ni provis fari nian plej bonan por doni al vi interesan kaj belan revuon, kaj ni esperas, ke vi ĝuos la rezulton.

Kvankam tiu ĉi numero estas pli ampleksa ol ordinare, eĉ 20-paĝa, mankas en ĝi multaj artikoloj kaj informoj, kies publikigo ni devis prokrasti ĝis la sekvonta numero. Ni petas tiujn, kiuj sendis al ni materialon, kiun ili ne retrovas en tiu ĉi numero, ke ili havu paciencon. Tio aperos.

Ni petas ke ankaŭ tiuj, kiuj lastatempe donis al ni multajn konsilojn kaj sugestojn pri la redaktado havu paciencon. Pro la aparta enhavo de tiu ĉi numero neniu el iliaj proponoj estas realigitaj. Tio tamen ne signifas, ke ni neglektas ilin — ni fakte ricevis kelkajn tre bonajn proponojn, kiujn ni provos realigi. Kaj ni estas ĉiam dankaj al tiuj, kiuj montras intereson por La Espero.

Fine mi mem petas pardonon ke mi lastatempe ne respondis al leteroj. Tio kompreneble ankaŭ dependas de la laboro pri tiu ĉi numero. Tamen estas ĉiam problemo por redaktoro, kiu devas dum liberaj horoj kaj redakti gazeton kaj korespondi kun ĝiaj legantoj. Li ĝojas pro ĉiu ricevita letero, sed la tempo ne ĉiam sufiĉas por respondi al ĝi, ĉar tiun tempon li devas en tia okazo forpreni de la redakta laboro.

Tamen, kiel ni jam multfoje diris, bonvolu skribi, sugesti kaj kritiki. Eĉ pri tiu ĉi numero!



SEPT.-OKT. 1972

Numero 5. 60-a jaro

Lasta dato por manuskripto por la sekvonta numero de La Espero: 8-a de novembro 1972!

UTSTÄLLNING ATT LÅNA

En utställning med rubriken "Vad har språket med miljön att göra" färdigställdes till Miljöforum i juni 1972.

Den är nu tillgänglig att visas på andra platser, t. ex. i bibliotek eller liknande lokaler. Erforderligt golvyt-rymme är ca 2 × 1 m, plus plats att gå runt utställningen. Höjd 2,2 m.

Stencilerade folders med samma text som utställningen kan också erhållas.

Kontakta SEF:s sekretariat, men gör det i mycket god tid!

TURISMO

Mi komencis kolekti svedajn turistajn broŝurojn kun teksto en esperanto. Tial mi petas vin ĉiujn sendi al mi 2 aŭ 3 ekz. se ekzistas de via urbo aŭ regiono. Poste mi intencas fari ekspozicion en nia nova "Esperantejo" en Spetsbergsgatan en Gøteborgo.

Samtempe mi ankaŭ volas akcenti, ke ni esperantistoj mem kulpas ke esperanto ne estas akceptita pli en la turismo. Ni devas lerni tute nature plej unue demandi ĉie "Cu vi parolas esperanton?". Kaj se ni venas al fremda urbo kaj petas informojn en turistoficejoj petu pri broŝuroj en esperanto, do ne en malbona angla lingvo. (Mi ne opinias ke angla estas malbona, sed ke la plej multaj svedoj uzas la lingvon malbone.)

Ni esperantistoj devas postuli helpon de la oficistoj kaj geservistoj en esperanto unue, ĉiam, ĉiam. Se ni tion faras ni venkos pli rapide, ĉar ni montras ke nia lingvo vivas. Se venas unu persono al doganstacio kaj demandas: "Cu vi parolas esperanton?" tio certe ne havas efikon. Sed se venas 10 personoj jam estas efika, kaj 50 aŭ 100 personoj eble jam kaŭzos revolucion ŝanĝon rilate al la sinteno de la doganistoj.

Do, ni provu!

Märtha Andréasson

BELA REVO?

Estas sabato. Mi sidas je taso da kafe kaj studas la poŝton ĵus veninta. Libro kun alloga eksteraĵo kaptas mian atenton. Ĝi estas unu el la unuaj libroj de novfondita libro-klubo "Antaŭen". Junaj verkistoj el diversaj landoj skribas pri aktualaj aferoj. La serio tuj iĝis tre populara, ĉar estas tre facile aboni kaj elekti interesajn librojn en tiu kolekto.

Nia gazeto "Norda Espero" zorgis pri reklamo por tiu ĉi novfondita libro-klubo. Slipo kun librotitoloj estis aldonita al ĝi; oni nur devas meti signon je tiu kiu interesas, poste venas la libroj kun intervaloj po unu por monato.

Nia "Norda Espero" ege progresas, ĵus nun la eldonkvanto superas 10.000 ekzemplerojn po monato. La ĉefredaktoro informas, ke li devis aĉeti pli grandan paperkorbon, ĉar kun pli da legantoj venas pli da kontribuantoj de samideanoj kiuj supozas ke ili povas surpaperigi ion legindan.

*

Jes, la supre skribita estas bedaŭrinde nur revo. La eldonado kaj vendado de esperantolibroj malbone funkcias. (La eldonkvantoj estas mizere malgrandaj, tamen oni konservas stokon de kelkaj libroj dum 20 aŭ 30 jaroj.)

Mi ne volas kritiki la libroservon de UEA. Ĝi estas bonega, kaj mi facile povas per ĝi ricevi librojn el la tuta mondo. Sed multaj samideanoj ne estas tiel aktivaj ke ili mem mendas librojn de UEA.

La kluboj devas el sia membraro elekti iun energian samidean(in)on kiu volas vendi esperantolibrojn. Neniu libro kuŝu nevendita, ĉar oni ankaŭ povas vendi per loterio.

Fine mi volas laŭdi la libron "La Normandaj Rakontoj" de Guy de Maupassant, traduko de Roland Dupuis. La libro estas tre interesa, bele ilustrita, rekomendinda al ĉiu legema progresanto. Ĝi estis havinda dum preskaŭ dudek (20) jaroj!

bla-

La samideano, kiu sendis al ni la supran artikoleon kaj kiu modeste kaŝas sin sub pseŭdonimo, dum multaj jaroj kun sia edzino tre aktive laboris por la vendado de esperantolibroj en sia rondo. Tio kion li volas diri, nome ke ni en la kluboj devas dediĉi pli da atento kaj laboro al la disvastigo de esperanta literaturo, estas tial des pli atentinda kaj la redakcio forte substrekas lian admonon. Kial oni nuntempe tiel neglektas tiun tre gravan kampon en niaj svedaj kluboj?

La redaktoro



La SVEDA SOMERA SEMAJNO en Frostavallen, aranĝita de la Sveda Esperanto-Instituto kaj subvenciita de la sveda registaro, estas konata en la Esperanto-Movado pro la alta nivelo de la prelegoj kaj la graveco de la diskutoj. Ĉi-jare ĝi okazis jam por la sesa fojo (30.7—6.8) kaj estis dediĉita al "La Problemo de lingva komunikado en la moderna mondo — Kun speciala atento al la situacio en Eŭropo", kaj jam la nomoj de la prelegintoj — Prof. D-ro Ivo Lapenna, D-ro W. Bormann, D-ro J. C. Wells, S-ro J. Thierry kaj D-ro K. Söderberg — atestas pri la grava kultura valoro de tiu aranĝo. La Sveda Esperanto-Movado fieras, ke ĝi denove havis eblecon gastigi eliton de prelegistoj kaj elitajn internacian publikon.

Fine, mi konas Frostavallen!

Jam de pli ol dudek jaroj, mi rilatigas mian ferion al Esperanto.

Antaŭ sep jaroj, ne povinte partopreni la UK en Tokio, mi decidis tamen vivi en esperanta medio kaj tiam elektis la Esperantistan Kulturdomon en Grésillon. Ĉi-jare ne povante partopreni la UK en Portland, mi decidis same sed ĉi foje elektis la S. S. S. en Frostavallen.

Oni povas diri, ke la vojaĝo al Frostavallen vere komenciĝas en Malmö. De tie, per aŭtoŝoseo, oni rapide veturas tra kampoj, kaj poste, per kutima ŝoseo oni preteriras jam montetojn, kaj fine oni trairas belektan arbaron por atingi la supron de la "muro" ĉar la nomo de Frostavallen tute ne rilatas al valo sed kontraŭe al muro.

Tie estas loko agrabla, ĉar oni situas meze de grandaj arboj, ĉirkaŭita de florbetoj kaj tute proksime de kvieta lago, kie la naĝantoj povas evolui laŭplaĉe.

Tie estas loko libera, ĉar neniu barilo limigas ĝin; oni ne bezonas malfermi pardonon aŭ sonori por eniri. Malgraŭ tio, neniu partoprenanto forkuras... Krome pere de la Internacia Lingvo oni ankaŭ ne estas limigita en la konversacioj kun la aliaj ĉeestantoj, kvankam ili estas ĉ. 100 el 13 diversaj landoj, do 13 lingvoj.

Mia unua kontakto estis ĉe la tablo, ĉar mi alvenis ĝuste je la horo de la unua lunĉo.

Diris prof. Lapenna:

Frostavallen jam delonge famiĝis en la Esperanto-Movado. Jam la sesan fojon okazas grava kultura aranĝo en tiu ĉi mirinde bela regiono, aparte taŭga por trankvila, serioza laboro en amika atmosfero, kun samtempa ĝuo de la naturo. Ĉiuj pasintaj SSS pritraktis aktualan problemon de ĝenerala intereso, kiu samtempe havis konkretan ligon kun la celoj de la Esperanto-Movado. Kaj ĉiam la rezultoj estis rimarkindaj el ĉiuj vidpunktoj: en la ekstera mondo altiĝo de la prestiĝo de Esperanto; interne de la Movado plia ŝtono en la konstruado de fortika UEA. La nuna SSS estas verŝajne la plej grava el ĉiuj, ĉar ĝi pritraktas eksterordinare kompleksan demandon, kiu fariĝis ĉiam pli grava kaj postulas urĝan solvon: la problemon de lingva komunikado en la moderna mondo. En ligo kun tio la dua ĉeftemo ekzamenas la pozicion de la Internacia Lingvo, ĝiajn perspektivojn kaj la taskojn de la Esperanto-Movado, kiuj devas esti formulitaj en la Tria Baza Laborprogramo de UEA. Ĉio indikas, ke la nuna SSS estas same sukcesa kiel la antaŭaj kaj ke la rezultoj signos plian grandan paŝon antaŭen sur la longa vojo al plena realigo de la celoj kaj idealoj de la Esperanto-Movado.

UEA kaj la tuta Movado ŝuldas dankon al la Sveda Esperanto-Instituto kaj al la Sveda Instituto por Kultura Interŝanĝo kun eksterlando pro la okazigo de la semajno, kaj kompreneble, unuavice al la ĉefa organizanto s-ro Jan Strönné, al liaj ĝehelpantoj, inter kiuj elstaras la nomo de F-ino Gulli Svensson. Koregan dankon ankaŭ de mi persone.



Pro mia vojaĝo tra Finnlando antaŭ tri jaroj, mi ne estis tro surprizita de la aranĝo de la bufedo, kie oni devas mem servi sin, elektante iujn manĝaĵojn inter la multnombraj oferitaj al via elekto.

Iu partoprenanto miris, vidante francon trinki akvon! Sed estas kutimo mia, ke mi jam delonge decidis vivi dum miaj vojaĝoj laŭ la maniero de la lando kie mi restas. Tiel mi trinkis vinon en Hispanujo, teon en Britujo, bieron en Germanujo, kaj akvon kaj lakton en Svedujo, se tie tio estas la kutimo!

Sed la manĝado ne estas ĉio. Oni devas ankaŭ loĝi, kaj por tio, oni disponis pri komfortaj ĉambroj, kie la lignaĵo alportas senton de intima varmeco. El mia larĝa balkono mi ekvidis arbojn kaj ankaŭ la malnovan gastejon, kiu estis plena je gejunuloj.

Mi scias ke pluraj partoprenantoj petis de s-ro Strönne kvietegajn ĉambrojn. Tio estis, laŭ mia konstato, superflua peto, ĉar dum la nokto regis silentego: kaj mi tiel bone dormis ek de la komenco, ke mi opiniis pli sekura uzi la vekigilon je mia dispono en la radioaparato de la dormoĉambro.

Krom tio, ni ankaŭ laboris, ĉar tio estis ankaŭ unu el la celoj. Ni do ĉiutage ĉeestis la diversajn tre interesajn prelegojn, kiujn faris Prof. Lapenna, d-ro Bormann, s-ro Thierry, d-roj Söderberg kaj Wells. (La prelegon de d-ro Söderberg laŭtlegis s-ino Ester Andrén, Malmö). La vesperoj estis uzataj por distri sin. Sub la prezido de s-ro Jan Strönne, ili okazis en tre agrabla kaj amuza etoso, despli ke s-ro Wells ne forgesis kunporti sian balgon, per kiu li regalis nin per agrablaj britaj, skotaj kaj irlandaj arioj.

Dum tiuj distraj vesperoj, ni ankaŭ havis la okazon vidi filmojn pri la Unua Semajno en Frostavallen (1953), la U.K. en Malmö (1948), Varsovio (1959) Sofio (1963) sur kiuj pluraj ĉeestantoj sin revidis "junigita"! La du unuajn filmojn prezentis s-ro Strönne kaj la du lastajn s-ino Andrén.

Iun vesperon, s-ro Allan Johansson el Malmö prezentis al ni enigmajn diapozitivajn. Ili montris naturojn sed pligrandigitaj kaj sub nekutima angulo de vidado. Mi memoras i. a. duonan blankan brasikon, ŝelon de ananaso, pipron de Hispanio (kiu similis al ruĝa balono sur bastono), ankaŭ internojn de floroj kaj truon en ŝtono kiu aspektis kiel lafkampon.

Post la programoj de tiuj distraj vesperoj, kelkaj partoprenantoj kunveniĝis en kelo! sed tiu kelo enhavas la bibliotekon. Tie oni trovis denove komfortajn seĝojn kaj malaltajn tab-

FROSTAVALLEN:

LA PRELEGOJ

Resumis A. J. Middelkoop, Nederlando



Prof. Ivo Lapenna.

lojn en koloroj nekutimaj (malhele bluaĵ kaj verdaj). Bone sidantaj en tiuj komfortaj seĝoj, oni diskutis, babilis, serĉis ĝis tre ofte noktomezo.

Oni povas do diri ke Frostavallen sufiĉas per si mem al tiuj, kiuj deziras multe ripozi post la laborkunveno. Sed oni povas ankaŭ veturi aŭ piediri al Höör, ĉarma urbeto apuda, kies larĝaj stratoj donas impreson de trankvileco. La ŝpruca fontano, sur la vilaĝmeza placo vivigas ĝin, kaj invitas al ripozo sur la benkoj lokitaj apud rozbedoj.

Alia ebla promonado estas al la bestĝardeno, kiun oni povas rapide atingi per vojeto traarbara el la bieno mem. Sed la vizito daŭras plurajn horojn kaj tiu ĝardeno estas sufiĉe vasta kaj alloga.

Ĉu tamen mi rajtas mencii iun mankon?? Laŭ mia opinio, dum la unua vespero, kies ero estis fakte anoncita kiel "interkona" estus bone se ĉiu partoprenanto sin prezentus mem al la aliaj per siaj nomo, lando kaj eventuale posteno en la esperanto-movado. Tio plifaciligus poste la personajn kontaktojn.

Fine, do, mi konis Frostavallen, kaj kiel mi iam diris al germana ĵurnalisto, kiu intervjuis min en Götingen, "tie, mi sentis min hejme".

Jack-André Rousseau
Francujo

Prof. I. Lapenna, Britujo:

- "Enkonduka raporto"
- "Pozicio de lingvoj en internaciaj organizaĵoj"
- "Pozicio kaj aspiroj de la rusa lingvo"
- "Jugoslavio: ekzemplo de solvo de interna lingva problemo"
- "La disvastigeco kaj instrueblecoj de Esperanto"

"Pozicio de lingvoj en internaciaj organizaĵoj". Antaŭ 1753 la franca havis superregan rolon en multaj landoj. En tiu jaro la angla registaro protestis, kaj tiel komenciĝis la lukto inter la franca kaj la angla. La nuna situacio estas, ke en U. N. estas kvin oficialaj lingvoj. La multlingveco serioze endanĝerigas la laboron. Tial oni akceptis laborlingvojn, sed kredeble malaperos la diferenco inter oficialaj kaj laboraj lingvoj. Multlingveco kostas 25 ĝis 30 milionojn da dolaroj jare.

"La disvastigeco kaj instrueblecoj de Esperanto" aŭ "Esperanto en perspektivo", kiu estas la titolo de eldonota libro. El ĝi prof. Lapenna citis ĉapitron pri lernolibroj, instrumetodoj k. t. p. Lernolibroj aperis en 59 lingvoj, ŝlosiloj en 39. Ekzistas ankaŭ internaciaj lernolibroj. Eksterlerneja instruigo povas okazi per meminstruo aŭ per kursoj (popoluniversitatoj, radio, televido, universitatoj). La rolo de UEA estas helpi kie estas vakuo, poste aliaj transprenas kaj daŭrigas la laboron. La statistikoj pri instruado de Esperanto en lernejoj montras modestan progreson. Ĝi estas instruita en 31 universitatoj en 16 landoj.

"Pozicio kaj aspiroj de la rusa lingvo". Prof. Lapenna skizas la historion de la rusa lingvo. Ĝi fontas el la lingvo uzita en la 14-a jarcento en Moskvo, kies evoluo en la 17-a kaj 18-a jarcentoj estigis la modernan rusan lingvon. La teatro kaj literaturo ludis gravegan rolon. La malnovslava restis eklezia lingvo kaj estis ĝis antaŭnelonge studata en la lernejoj de ĉiuj slavaj landoj.

Ekzistas proks. 100 nacioj en USSR. La soveta lingva politiko celas rusigon de la etnaj grupoj. En la ne-rusaj lernejoj en USSR la rusa lingvo estas

deviga, ankaŭ en multaj orienteŭropaj landoj.

Sub Stalin la Esperantistoj estis persekutataj, ĉar ili apartenis al la lasta de du persekutataj kategorioj: burĝaj naciistoj (nerusaj ŝtatoj de USSR) kaj kosmopolitoj.

"Jugoslavio: ekzemplo de solvo de interna lingva problemo". La popoloj de Jugoslavio estis dum ok jarcentoj sub fremda regado. Ĉe la formiĝo de la nuna ŝtato prezentigis la problemo: kiun lingvon preni? Ekzistis tri grupoj de dialektoj. Kiel bazon de literatura lingvo oni prenis grupon, kiu estis komuna por serboj kaj kroatoj. En 1963 la nacia egaleco estis rekonita ankaŭ de lingvoj (kroata, slovena, serba, makedona). Ĝi aplikiga ĉie: en lernejoj, kortumoj k. t. p. Ĝi estas justa solvo, sed kostas amason da mono. La dalmatia dialekto vivas plu kiel popola lingvo.


D-ro W. Bormann, Germanujo:

- "La germana kiel nacia lingvo"
- "La germana kiel fremda lingvo"
- "Lingvaj reguloj en eŭropaj unuigoj"

Pri la germana lingvo d-ro W. Bormann faris 2 prelegojn, en kiuj li eliris ne de lingvistika, sed politika vidpunkto. Li vidas konflikton inter du homaj rajtoj: lingvaj minoritatoj (ekz. la parolantoj de la malaltgermana) havas la rajton uzi la propran lingvon, sed ankaŭ partopreni en la komuna bonfarto, kaj tio ĉi ne eblas sen perfekta kono de la oficiala lingvo. La germana havas fortan pozicion en la landoj, kie ĝi estas oficiala, eĉ tiel ke fremdaj lingvoj estas survoje fariĝi nedevigaj fakoj en la gimnazioj, sed ĝi malkreskas kiel minoritata lingvo en aliaj landoj. La dialektoj estas malaperantaj dank'al televido, gazetaro kaj migrado al urboj. Kiel fremda lingvo la germana ofte estas la dua aŭ tria lingvo post la angla kaj franca aŭ rusa. La kulturpolitiko ne plu unualoke strebas al disvastigado de la lingvo, sed de kulturinterŝanĝo. Kiel traduklingvo la germana havas negativan kultursaldon al la angla kaj franca.

"Lingvaj reguloj en eŭropaj unuigoj". Ekde 1948 oni klopodas stariĝi kunlaboron en Eŭropo. Sinsekve estis fonditaj la Eŭropa Konsilantaro, la Ekonomia Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo, la Eŭropa Liberkomerca Asocio kaj (fondota) Eŭropa Patent-Oficejo.

Oficialaj lingvoj estas en Eŭropa Konsilantaro kaj ELKA la angla kaj franca; en EPO angla, franca kaj germana. La traktato pri la Karbo kaj Ŝtalo estis en la franca. La kontrakto, kiun la EEK (ĝis tiam 4 lingvoj) faris en 1972 kun la novaj membroj, estis redaktita en 7 lingvoj. Pompidou konsideras la francan la



D-ro W. Bormann.



D-ro J. C. Wells.



Bormann kaj Wells diskutas en la restoracio.

lingvo de Eŭropo, la anglan tiu de Usono. Kiel komunan vorton por "Akcia Kompanio" oni elektis "Societas Europea" (latina).

D-ro Bormann menciis, ke por la Internacia Universitato en Firenze la propono estis, ke ĉio okazu en la angla kaj franca. La germano Leussing vetois. Nun la decido estas, ke 5 lingvoj estu oficialaj. La danaj kaj norvegoj ne protestis. La dana kaj norvega Esperanto-Asocioj devos pripensi, ĉu ili reagu.

En la posta diskuto Prof. Lapenna opinias, ke niaj Landaj Asocioj preteratentis la okazon atentigi pri la lingva situacio. Estus eble enŝovi Esperanton en Firenze.

D-ro J. C. Wells, Britujo:

- "La angla kiel gepatra lingvo"
- "La angla kiel fremda aŭ dua lingvo"
- "La minoritatoj en Britujo kaj Irlando"

La anglan lingvon pritraktis d-ro J. C. Wells en tri prelegoj. Ĝi estas gepatra lingvo de 280 milionoj da homoj. Ĝiaj karakterizoj estas: stranga fonetiko, simpla morfologio, kaosa ortografio, komplika sintakso. Flekso kaj konjugacio estas aglutinaj, derivado ne. La vortprovizo havas heterogenan devenon. La diferenco inter la normlingvo de Britujo kaj de aliaj angle parolantaj landoj estas negravaj, nur prononcdiferencoj estas rimarkindaj.

Je kelkaj demandoj d-ro Wells respondas, ke en Britujo oni ĉiam komprenas la usonajn filmojn, sed en Usono oni aldonas tekston al anglaj filmoj tie montrataj. Se usonanoj konsideras sian prononcon pli ĝusta ol la anglan, tion kaŭzas la fakto, ke ili konservas la originan prononcon el la kolonia tempo.

La lernado de la angla signifas por tiuj landoj, kie ĝi estas deviga, preskaŭ kulturalan memmortigon. En kelkaj antaŭaj kolonioj (Hindujo, Zambio) ĝi ludas rolon de neŭtrala komuna lingvo. Tamen studentoj en tiuj landoj malbone komprenas la lekciojn en Britujo.

Pri la keltaj lingvoj (kimra skota kaj irlanda) d-ro Wells rakontas, ke post longa subpremado oni nun akcelas ilian uzadon. Tamen la lukto kontraŭ la angla estas malfacila (ekonomio, turismo). D-ro Wells klarigas la mutaciojn kiuj karakterizas la keltajn lingvojn.

Multaj demandoj atestas pri la intereso pri ĉi tiu temo. D-ro Wells respondas jene. En Irlando la angla estas ĉiutaga lingvo; la irlanda funkcias kiel dua. De la radio- kaj televidelsendoj eble kvarono aŭ triono okazas en la irlanda. Ekzamenoj en la universitato okazas en la angla.

LA PRELEGOJ

(Daŭrigo)

S-ro J. Thierry, Francujo:

— "La franca lingvo kiel denaska aŭ familia"

— "La franca lingvo kiel komuna aŭ dua"

— "La lingvaj minoritatoj en Francujo"

S-ro J. Thierry prelegis pri la franca lingvo. Li konsideras ĝin 1-e laŭ nuntempaj karakterizoj, 2-e laŭ regionaj diferencoj, 3-e laŭ sociaj diferencoj.

1-e. Ekzistas tendenco al konfuzo inter vokaloj. Ĉe la multaj homonimoj nur la antaŭmetitaj vortoj difinas la signifon. Vere vivantaj restas nur kelkaj formoj en la konjugacio.

2-e. Ĝi estas parolata en 5 kontinentoj. En Afriko kaj Azio ĝi restis precipe administracia kaj lerneja lingvo. En Francujo ne mankas diferencoj fonetikaj, sintaksaj kaj leksikonaj inter la regionoj.

3-e. La vulgara lingvo estas karakterizata de malstreĉiĝo de fonetiko.

La Franca Akademio havas grandan influon. Dank' al ĝi la franca lingvo estas la plej unueca de la mondo. Nun tamen minacas rompo inter la parolo kaj la skriba lingvoj, ĉar oni legas malpli multe. S-ro Thierry vidas danĝeron en la "frangla", ĉar ne temas nur pri prunteprenado de anglaj vortoj, sed ili misinfluas la lingvokonscion kaj transformas francajn vortojn.

Al kelkaj demandoj s-ro Thierry respondas, ke la nombro de france parolantoj montras konstantan kreskon, ke indiĝenaj lingvoj estas instruataj en Afriko se ili estas sufiĉe fortaj (Haussa, Svahila), kaj ke la invado de la angla influas ankaŭ la gramatikon.

En sia tria prelego s-ro Thierry donis historian superrigardon. Li distingis ok etapojn ekde 52 a. k., kiam la devastiĝo de la latino komenciĝis. En ili jen pli, jen malpli fortiĝis la latina, resp. la ĝermana influoj. La oficiala uzado de la lingvo de Parizo daŭrigas de la 14-a jarcento, sed ankoraŭ en la hodiaŭa etapo ekzistas restoj de ĝermanaj dialektoj (flandra, alzaca). La bretona estas parenca al la kimra. La deveno de la vaska lingvo estas mistero. Eble la vaskoj devenas de gaskonoj kaj akvitanoj. Ilia lingvo havas kompleksan verban sistemon, aglutinan sistemon de substantivoj, leksikan influon de keltaj kaj gallaj lingvoj kaj latino. Ekde 1951 ĝia nedeviga instruado estas permesata.

D-ro K. Söderberg, Svedujo:

— "La instruado de fremdaj lingvoj en Svedujo; Avantaĝoj kaj danĝeroj"

La prelegon de d-ro K. Söderberg voĉlegis s-ino Ester Andrén, Malmö, Svedujo. La svedaj aŭtoritatuloj opinias, ke infanoj lernu la anglan ekde la tria klaso de la baza lernejo. Oni vigle diskutas pri la plej bona instrumentado. En la gimnazioj ĝis nun nur la humanisma flanko lernis multe da lingvoj, sed nun oni komprenas, ke ankaŭ por aliaj fakoj la lingvoj estas necesaj. D-ro Söderberg vidas danĝeron en favorado de kelkaj grandpotencoj. Fremda lingvo influas la nacian (vortprovizon, pli malfrue ankaŭ la sintakson). La aserto, ke ni evoluas al lingva unueco, estas falsa.

A. J. Middlekoop Nederlando

SVEDA SOMERA SEMAJNO

Frostavallen

30 julio—6 aŭgusto 1972

DISKUTOJ PRI LA 3-a LABORPLANO DE UEA

Tre konciza raporto de la diskutoj pri la 3-a laborplano de UEA, okazintaj en Frostavallen, Svedujo, la 1-an, 3-an kaj 5-an de aŭgusto 1972 (Detalan protokolon faris F-ino A. J. Middlekoop, Nederlando).

La gvidanto de la diskutoj, prof. d-ro Ivo Lapenna, konstatas ke la plimulto de la eroj de la 2-a laborplano estas plenumita. Preskaŭ realigitaj estas la taskoj de la centraj organoj; tiuj de la Landaj Asocioj ne estas plenumitaj.

La komitata kunsido en Londono (1971) starigis komisionon (kunvokanto: s-ro Ib Schleicher, Danujo) por prezenti proponon pri 3-a baza laborplano. Pro diversaj kaŭzoj la komisiono tamen ne havis eblecon labori, kaj s-ro Schleicher pro tio prezentis memfaritan materialon pri 3-a laborplano. Kelkaj kritikoj aŭdiĝas: Mankas praktikaj, konkretaj konsiloj; la tuto estas prezentita kvazaŭ nenio estus farita; ŝajnas kvazaŭ ne ekzistas 1:a kaj 2:a laborplanoj.

Laŭ propono de la gvidanto oni poste preparolis la diversajn punktojn de la 2-a laborplano. Inter pluraj sugestoj, proponoj kaj diskuttemoj notindaj estas i. a.:

La premisoj ankoraŭ validas. La rubrikoj fariĝos: A) UEA B) Landaj Asocioj C) Fakaj organizoj D) Unuopuloj. Oni konstatas, ke TEJO fortiĝis; nun stariĝas la problemoj de ĝia intergrigo en UEA.

La prezidanto insistas, ke estas morala devo de la Landaj Asocioj fari propran laborplanon. Kelkaj ĉeestantoj opinias, ke por akceli la vendadon de libroj la distribuado devos esti pli bone organizita. Pri la demando ĉu lokaj grupoj aŭ federa-



De maldekstre: Liisi Oterma, Meri Vuorela kaj Irja Klemola el Finnlando, Verner Lundqvist kaj Karl Gustafsson el Svedujo.



Ragnar Hjorth, Svedujo, notas la sugestojn de J. A. Rosseau, Francujo.

FROSTAVALLEN EN 1972
KONKLUDOJ

EKZAMENO de la MONDA LINGVO-PROBLEMO

kaj

KONKLUDOJ de la seminario en FROSTAVALLEN 1972

La Internacia Seminario "Sveda Somera Semajno" kun la prelegtemaro "La Problemo de Lingva Komunikado en la Moderna Mondo — kun speciala atento al la situacio en Eŭropo", organizita de Sveda Esperanto-Instituto en kunlaboro kun Sveda Instituto por Kultura Interŝanĝo kun Eksterlando kaj kun Universala Esperanto Asocio, okazinta en Frostavallen, Svedujo, de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1972; en kies laboroj partoprenis 105 personoj apartenantaj al internaciaj, landaj, lokaj kaj fakaj Esperanto-organizaĵoj en 13 landoj,

aŭdinte kaj pridiskutinte 15 raportojn de kompetentaj fakuloj pri

- 1) la pozicio de lingvoj en interŝtataj internaciaj organizaĵoj kun speciala konsidero al la situacio en la eŭropaj institucioj;
- 2) la bazaj strukturaj trajtoj kaj aktuala disvastigiteco en la mondo de la angla, franca, germana, rusa kaj Internacia Lingvo (Esperanto) el vidpunkto de internacia komunikado;
- 3) la lingva politiko de la grandaj kaj mezgrandaj potencoj rilate siajn respektivajn lingvojn kaj la aspiroj, rezistoj kaj tensioj ligitaj al tiu politiko;

konkludas, ke

- 1) kiel antaŭvidinte en gravaj dokumentoj de Universala Esperanto Asocio la tuta evoluo de la lingva demando en internaciaj rilatoj en la postmilita periodo daŭre komplikiĝis pro la kreskanta nombro de oficialaj kaj laboraj lingvoj, kio necese kondukas al neeltenebla stato el vidpunkto de suverena egaleco, kostoj kaj efikeco;
- 2) tiu situacio devigos la registarojn rekonsideri la ĝisnunan lingvopolitikon, kiu evidente fiaskis, kaj direkti sin al la sola ebla eliro: la aplikado de ununura lingvo por internacia komunikado, kiu, pro politikaj, pure lingvaj, psikologiaj kaj aliaj kaŭzoj, ne povas esti kiu ajn nacia lingvo, sed nur la neŭtrala Esperanto, jam pruvita en la praktiko kiel plene taŭga instrumento de internacia komunikado;
- 3) ĉar la premisoj de la dua Baza Laborprogramo de Universala Esperanto Asocio montriĝis ĝustaj, en la aktualaj kondiĉoj la nun ellaborata tria Baza Laborprogramo difinu la ĉefajn taskojn de la Esperanto-movado precipe rilate intensigon de informado al internaciaj instancoj, registaroj kaj vasta publiko pri la solvo, kiun prezentas La Internacia Lingvo.

cioj de regionaj grupoj estas preferindaj, oni ne samopinias. Pri la enhavo de la landaj organoj ne ĉiuj estas kontentaj. Ili devas esti informaj, mobilizaj kaj distraĵaj.

Fine D-ro Lapenna proponas konkludon, kiun la ĉeestantaro unuanime akceptas:

La kunveno en Frostavallen kun 105 ĉeestantoj el 13 landoj en tri kunvenoj pridiskutis la demandojn, kiuj devus eniri en la trian bazan laborprogramon de UEA. Ĝi aŭdis la ra-


porton de s-ro Schleicher, kaj ĝi en du kunvenoj punkton post punkto prilaboris la duan bazan laborprogramon por vidi, kiuj el la eroj de la dua baza programo devus eĉ eniri en la trian bazan laborprogramon kaj kiuj devus esti kompletigitaj per novaj ideoj. Sekve la kunveno rekomendas al la Estraro de UEA en la ellaboro de la tria baza laborplano preni en konsideron la sugestojn kaj proponojn, kiuj estis esprimitaj dum la kunveno en Frostavallen.



Ib Schleicher diskutas.




Gulli Svensson informas.



Wells muzikas.



Lapenna kaj Gustafsson babilas.



VOĈOJ

Frostavallen: La restoracio.

F-ino Liisi Oterma, Finnlando. *Koran dankon pro la grandioza somera semajno en Frostavallen...*

S-ro A. Lundqvist, Svedujo. *La sesan fojon mi nun vizitas Frostavallen kio sufiĉe montras, kiel la aranĝoj plaĉas al mi...*

S-ro Alberto Menabene, Italujo. *Unuafoje mi partoprenis seminarion en Frostavallen. Ĝi ŝajnas al mi tiel bone aranĝita kaj interesa, ke mi certe partoprenos ankaŭ la estontajn...*

D-ro J. C. Wells, Britujo. *Nun la unuan Fojon mi vizitis Svedujon. La bela pejzaĝo de Skanio ravis min. La programo de la SSS estas admirinda. Ni povis fari seriozan laboron en agrabla etoso. Preleginte ĉi tie interalie pri la kimra lingvo, al esperanta 'saluto' kaj angla 'greetings' mi aldonas kimran 'croseo'.*

S-ro Gösta Norling, Svedujo. *La duan fojon en Frostavallen kun Esperantistoj. — Kaj mi tre volonte revenos.*

Ges-oj O. C. Lange & Greta Lange, Danujo. *Ni ĝuis ankoraŭfoje en Frostavallen belajn tagojn, interesajn, en amika atmosfero, kaj certe utilajn al la Esperantomovado...*

D-ro Werner Bormann, Germanujo. *Por sukcesa seminario necesas 3 punktoj: bonaj prelegoj, bonaj partoprenantoj, bona ĉirkaŭaĵo. Frostavallen donis la perfektan kadron por niaj laboroj. Kiel preleganto pri "La pozicio de la germana" mi ne povas prijuĝi la paroladojn, sed ni ege klopodis je alta nivelo. Kaj por tio la esperantista publiko ĉeestanta estis vere bona kunularo. Estis agrabla, ser ankaŭ informriĉa semajno. Koran dankon al s-ro Strömne kaj al f-ino Svensson...*

S-ro Karl Gustafsson, Svedujo. *Frostavallen estas ja nek frosta nek valo — pli vere monto de dolĉa varmo internacia dum la ĉarma Sveda Somera Semajno. Dankas kore.*

F-ino A. J. Middelkoop, Nederlando. *La restado en Frostavallen kaj ĉiuj aranĝoj estis vere ĝuindaj.*

S-ino Meri Vuorela, Finnlando. ... bona, riĉenhava estis SSS en Frostavallen

S-ro J. A. Rosseau, Francujo. *Por la unua fojo en Frostavallen mi tamen ne frontis "Malvarman Muron" sed kontraŭe trovis ĉi tie amikecan kaj ankaŭ alt-nivelan etoson, ne nur ĉe la prelegoj sed je ĉiu momento de la restado...*

S-ro A. Diaz, Hispanujo (nun en Londono). *La restado en Frostavallen vere tre agrabla...*

PRI SSS

De maldekstre: Arne Kolle,
Grete Lange, S-ino Rodenhuis-Boll,
W. Rodenhuis.



S-ino J. Dunnewold & F-ino W. Blomme, Nederlando: *Dankon pro la bona organizado. Bona vetero. Abunda manĝaĵo. Altnivelaj prelegoj.*

S-ro Jean Thierry, Francujo. Por la dua fojo en Frostavallen mi ĝojas trovi la ĉarmon de tiu ĉi arbara nesto, la fruktodonan programon de SSS, la konfirmon de miaj unuaj impresoj... Kun tre koraj dankoj al la organizanto de tiaj semajnoj.

S-ro Albert Goodheir, Skotlando. *Mia unua vizito al Svedujo kaj Frostavallen. Mi ĝuis ĉiun momenton...*

S-ino Heta Kesälä, Finnlando. Mi certe revenos, se eble. Dankon al ĉiuj...

S-ro W. Rodenhuis kaj s-ino G. J. Rodenhuis-Boll, Nederlando. *La unuan fojon ni vizitis Frostavallen. Ni jam aŭdis multe pri ĝi, sed la atendoj estas komplete superigataj. Ĉio estas bona. La organizado de s-ro Jan Strönne, la zorgemo de f-ino Gulli Svensson. Oni jam nomas ĝin "La anĝelo de Frostavallen". Ni havas nur laŭdon.*

S-ino Francine Ballaven, Francujo. Dankon pro tiu neforgesebla SSS...

S-ro Ragnar Hjorth, Svedujo. *Dankon mallongan (sed varman).*

S-ino Vera Wahlberg, Svedujo. Tute ravita de ĉiuj belaj arangoj eĉ pro fulmotondra aplaŭdo mi tutkore dankas.

Ges-oj Arne & Sigríd Kalle, Danujo. *Bona semajno, interesaj prelegoj, bela ĉirkaŭaĵo. Ni revenos...*

F-ino M. Luthi & S-ino G. Gacond, Svisujo. Pro la bela restado, la interesaj prelegoj ni dankas tutkore.

S-ro Lauge Madsen, Norvegujo.... *Mi vere ĝojas, ke mi povas partopreni...*

S-ro J. Guillaume, Francujo. Mi aŭdis pri Frostavallen — sed nun post restado mi komprenas la plezuron vivi ĉi tie. Multe mi ĝuis la programon kaj vivon. Mi konservas bonegan memoraĵon pri tiu restado.

S-ino Irja Klemola, Finnlando. *Eĉ guto malgranda konstante frapante.. Tutkoran dankon pro via granda sukcesa laboro por SSS...*

S-ro M. Duplan, Francujo. Dankon pro la amika etoso...

S-ino Elsbeth Bormann, Germanujo. *Espereble iam denove mi povos akompani mian edzon al Frostavallen por esti denove en tiu agrabla loko.*

S-ro Louis Stein, Usono.... Mi dankas por afabla helpo en ĉiuj rilatoj...

EL LA SOMERO

LA FERIAJ KURSOJ EN HELSINGÖR

apartenas al la tradiciaj esperantaj kunvenoj. Ĉijare la aranĝanto s-ro Friis povis meti la numeron 41 antaŭ la semajnon 23—30 de julio, kiun partoprenis 150 gesamideanoj el 11 landoj: Svedujo, Norvegujo, Danlando, Finnlando, Francujo, Nederlando, Germanujo, Hispanujo, Svisujo, Usono kaj Aŭstralio.

La komencantaj balbutuloj, la perfektigemuloj kaj la konversaciaj gesamideanoj havis ĉiutage okazon sub la gvidado de spertaj geinstruistoj diversnivele dum 3 horoj lerni kaj ekzercadi. La finrezulto estis kontentige bona.

La internacia atmosfero kaj agrabla kunestado en la modernaj ejoj de la Internacia Altlernejo kreis senton de kora amikeco, kiu vere postlasis ĉe ĉiuj neforgeseblajn memorojn.

Ĉiuvespere ni aŭskultis prelegojn kun lumbildoj kaj filmoj. Inter alie nia hamburga samideano d-ro Borman faris interesan paroladon pri Albrecht Dürer kaj pri la hodiaŭa situacio de la mondlingva demando.

Multaj ekskursoj, interalie al la sveda urbo Helsingborg, donis varieton al la kurssemajno. La konata dana manĝotablo faris nekontraŭstaroblajn atakojn, kiuj havis korpajn sekvojn, sed kiu pensis pri tio antaŭ la tentantaj bongustajoj.

Bona vetero, efika instruado kaj la ĉiamaj zorgoj pri nia bonfarto de ges-oroj Friis kaj iliaj kunhelpantoj faris la semajnon altvalora kaj neforgesebla.

Mi volas admoni tiujn, kiuj estonte havos tempon kaj eblon, eluzi la feriajn kursojn en Helsingör, aliĝi kaj ĝui la avantaĝojn, al kiuj s-ro Friis per sia agado invitas.

Einar Dahl

LA SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ 1972 EN LIÈGE

La Someraj Universitataj Kursoj estis malfermitaj lundon, la 31-an de julio, fare de Ernest Natalis, emerita profesoro de la Universitato de Liège.

Tiuj ĉi kursoj, kiuj daŭris ĝis la 20-a de aŭgusto, estas — laŭ la opinio de P-ro Natalis — aŭdaca eksperimento, ĉar la sola laborlingvo de la kursoj estas la internacia lingvo Esperanto. Tiel, do, la kursoj de Liège povus esti la kerno de vere universala universitato, en kiu kune laborus sciencistoj el ĉiuj landoj utiligante la Internacian Lingvon senkonsidere de la propra lingvo.

Natalis, vaste konata pedagogo, memorigis pri la granda humanisto Jan Komensky, kiu ripete sugestis ke oni kreu logikan lingvon por florigi ĝeneralan klercon. Tiun ideon efektivigis L. Zamenhof kreante la Internacian Lingvon. Kiam la profesoroj kaj studentoj praktikas Esperanton, ili plenumas la de Komensky emfazatan postulon de empirio, nome ke en certa momento la ago superas la vorton kaj ke oni eksperimentu.

Prof. Natalis, plie, substrekiis ke miloj da valoraj verkoj, ekz. sur la kampo de pedagogio, kvazaŭ perdis pro la diverslingveco kaj la manko de sufiĉaj tradukoj.

En la du studdirektoj "Lingvistiko" kaj "Medicinaj Sciencoj" lekciis dum la sekvantaj semajnoj universitataj profesoroj el Grandbritio, Japanio, Hungario, Usono, Norvegio, Francio, FR Germanio kaj Belgio. Aliĝis al la kursoj kvindekda gestudentoj el 11 landoj. En la akompana programo troviĝis akceptoj fare de la Universitato, la Provinco kaj la Urbo kaj studvizitoj al diversaj institucioj rilatantaj la kursojtemojn.

DAN—SVEDA TAGO

La esperantistoj en la Suda Distrikto sveda kaj la danaj esperantistoj aliflanke de Öresund renkontiĝis la unuan dimanĉon en septembro.

Ĉi-jare la danaj esperantistoj estis aranĝintoj. La 3-an de septembro la loko por la renkontiĝo estis Fredriksberg, la urbo situanta en la ĉefurbo Kopenhago. En la urbodomo la partoprenintoj estis akceptataj de la urbestra anstataŭanto, kiu poste invitis al komuna kaftablo. Krome estis vizitata "4. Maj Kollegium" kaj "Fredriksbergs Slot". Estis por ni speciala favoro viziti tiun kastelon, konstruitan en 1710 por la reĝo Frederiko la VI:a kaj de antaŭ 100 jaroj funkcia kiel lernejo por estontaj oficiroj. — Ege interesa tago.

Ea.

— Mia fianĉino ĉiam fanfaronas ke ŝi edziniĝos al la plej impona viro de la urbo.

— Tio ja estas malbona, kiam vi estas ŝia fianĉo.

★

Sinjinoro — Ĉi nokte vi parolis en la dormo, Olĉo.

Sinjinoro — Ĉu vere, tiujn vortojn mi opinias vere vi povas permesi al mi.

EKSPOZICIO ĈU LINGVO ESTAS PARTO DE LA HOMMEDIO?

La UN-konferenco pri la homa medio okazis en Stockholm en junio. Kun granda peno ĝi atingis la plej necesajn celojn, inter alie deklaron pri la medio, kaj ĝi ankaŭ sukcesis tiri la atenton al la mediodemandoj.

Tamen, multajn gravajn problemojn ĝi ne tuŝis. La problemon de lingvo eĉ neniu proponis por pri-trakto.

Ĉu la lingvo do estas mediodemando? Ni diras jes. La lingvo estas grava parto de la socia kaj kultura medio.

Samtempe kun la UN-konferenco okazis en Stockholm pluraj alternativaj konferencoj, malfermitaj al ĉiuj. Tie estis la Medioforumo, aranĝita de la sveda UN-asocio kaj la junulara tegmenta organizaĵo SUL. Plue estis la Forumo de la popolo, en kiu la internacia mediogrupa Daŭriga ludis gravan rolon. Kaj estis la Forumo de la vivo, aranĝita de usona grupo.

En la kadro de la Medioforumo, kiu uzis la lokojn de la arta altlernejo, troviĝis ekspozicio aranĝita de SEF. Ĝi havis tre favoran lokon: ĉe la eniro de la granda prelegejo.

La ekspozicio havis kiel rubrikon "Vad har språket med miljön att göra?" Sur ses angulformaj tabuloj ni povis respondi al la demandoj. La teksto troviĝis ankaŭ sur multobligita faldfolio (ankoraŭ havebla!), ne nur en la sveda sed ankaŭ en Esperanto kaj en la angla, franca, germana kaj finna lingvoj.

Se oni volas mezuri la sukceson de la ekspozicio laŭ postaj informetoj, ĝi estis tre malsukcesa. Sed se oni mezuras laŭ kvanto da homoj kiuj renkontis la ideojn pri internacia lingvo, tiam ni povas esti kontentaj.

Mi volas fine citi la lastajn frazojn de la ekspozicia teksto, la konkludo de ĝia enhavo:

"Elektio de internacia lingvo estas demando pri egaleco.

Ni volas, ke oni solvu la lingvan problemon tiel ke

— ĉiuj havu la saman elirpunkton. Neniu havu avantaĝojn ĉar li parolas sian gepatran lingvon internacie.

— ĉiuj povu utiligi la elektitan solvon. Interpretado ne estas akceptebla solvo!

— ĉiuj povu lerni la elektitan lingvon facile, en mallonga tempo kaj je akceptebla kosto — kun akceptebla foruzo de rimedoj.

— ĉiuj landoj havu la eblecon informi pri sia kulturo, politiko kaj pensmaniero."

Ulla Luin

PORTLAND — LA MONDKONGRESO



IMPRESOJ PRI LA KONGRESO

"Se ĉiu homo en ĉiu lando lernus la saman duan lingvon, dum lia propra nacia lingvo restus la unua, la lingva interkomunikado evidente plibonigus. Statestroj, komercistoj, sciencistoj ktp. povus paroli kaj skribi rekte unu al la alia sen dependi de interpretistoj kiuj povas erari en sia interpretado."

Tiu citaĵo estas traduko el gvidartikolo la 2-an de aŭgusto en la granda tagjurnalo *The Oregonian*. La rubriko estis "Ili havas la ĝustan ideon". Iom pesimisme la verkinto finis sian artikolon jene, parolante pri la post-sekvantoj de Zamenhof: "Ili progresas nur malrapide kaj iliaj esperoj eble neniam realiĝos. Sed ili havas la ĝustan ideon!"

La artikolo atestas pri du gravaj faktoj: En Portland kiel aliloke en la mondo la homoj ĝenerale havas simpation kaj respekton por la celoj de la Esperantomovado, malgraŭ ke ili ofte estas skeptikaj pri niaj eblecoj realigi tiujn celojn. Due, la 57-a Universala Kongreso de Esperanto vekis grandan atenton en Portland kaj Oregon. La informado al la ekstera publiko estis bonega. Televiziaj elsendoj, radioprogramoj, multaj artikoloj en *The Oregonian* kaj *The Oregon Journal*, la du grandaj lokaj tagjurnaloj, kaj ankaŭ granda artikolo kun multaj bildoj en *The New York Times*, la mondkonata gazeto, kiu sendis ĵurnaliston kiu restis ĉe la kongreso dum kvar tagoj. Laŭnombre la UK en Portland ne apartenas al la grandaj, la oficiala nombro da partoprenantoj estas 923 el 40 landoj, sed unu argumento por aranĝi Universalan Kongreson tiel longe for de la eŭropaj centroj estis ĝuste la neceso

atentigi la publikon en aliaj partoj de la mondo pri nia movado kaj nia lingvo. La portlandanoj bonege utiligis la okazon!

Kiam tiu ĉi numero de *La Espero* atingos vin, certe aperis jam Revuo *Esperanto*, Heroldo k. a. kun detalaj raportoj pri la 57-a. Se mi tie ĉi provus rakonti pri ĉiu ero de la tre riĉa kaj varia programo de tiu semajno, mi timas, ke mi tedadus vin, ĉar estus nura ripetado de io kion vi jam legis. Mi tial elektis rakonti nur pri kelkaj eventoj kaj pri miaj ĝeneralaj impresoj, esperante ke tiel vi tamen trovos ion interesan.

Certe la kongreso estis bone lokigita en tiu granda, luksa Hotelo Hilton en la vera centro de Portland. La grandaj kunvensalonoj, kiuj facile englutis milon da homoj, estis en la subtera etaĝo, facile troveblaj, kaj multaj el ni kiuj partoprenis loĝis en la hotelo mem, tiel ke en la liftoj svarmis esperantistoj kaj aŭdiĝis nia lingvo. Tio per si mem certe vekis atenton, same kiel faris la granda bonveniga ŝildo en la vestiblo.

En la Interkonatiga Vespero sabato ni serĉis malnovajn gekonatojn inter la svarmantaj homoj. Nia egipta samideano Tadros Megalli, kiu iam veturis tra Svedujo prelegante, estas ĉiam facile distingebla pro fezo kaj egiptaj vestaĵoj same kiel lia samlan-

dano Nassif Isaac el Aleksandrio. Kelkaj svedoj aperis, entute partoprenis 20-o da svedoj, kaj tio certe estas kontentiga nombro, se oni konsideras la longan distancon. Evidente alvenis multaj japanoj kaj ankaŭ nov-zelandon mi renkontis en tiu unua vespero. La aranĝoj estis tre bonaj: oni povis ĉirkaŭpromeni en la vasta salonego aŭ oni povis havigi iun trinkaĵon kaj sidi ĉe rondaj tabloj interbabilante.

La Solena Malfermo en la dimanĉo estis ja solena sed sufiĉe formala afero. En foresto de Profesoro Lapenna s-ro Holmes, honora prezidanto de UEA, prezidis la kongreson. La alta protektanto Tom Mac Call, ŝtatestro de Oregon, ne povis ĉeesti sed sendis saluton, same kiel la urbestro de Portland. Ĉeestis tamen kelkaj oficialaj reprezentantoj, i. a. de la Universitato de Portland. Kelkaj registaroj estis oficiale reprezentitaj, i. a. la sveda por kiu salutis rektoro Söderberg, informante la kongreson pri la ŝtata subvencio al la oficiala aranĝo en Frostavallen. Kiam estis la vico de la reprezentantoj de la landaj asocioj, Ake Blomberg salutis por SEF. Muŝiko de D-ro J. Balcar agrable interrompis la vicon da salutoj diversspecaj.

La festan paroladon faris Günther Becker, ĝenerala sekretario de UEA, kaj post tiom da salutoj kaj bonvenigaj paroladoj oni estis dankaj al li, ke ĝi estis mallonga. Li komencis citante la emociajn vortojn de Zamenhof je la 6-a UK en Washington en 1910: "Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas. Lando, pri kiu re-

vis kaj ankaŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaĵaj persekutatoj, mi vin salutas." — Estus interese scii, kiuj el la ĉeestantaj kongresanoj konsentus kun tiuj zamenhofaj vortoj se ili estus eldiritaj hodiaŭ kaj kiuj ne! Intertempe Usono fariĝis eble la plej potenca nacio de la mondo kaj kiel tia renkontas kritikon el multaj radikalaj rondoj. S-ro Becker ankaŭ mem diris, ke la tempoj certe ŝanĝiĝis kaj ni ne scias, kiujn vortojn Zamenhof uzus hodiaŭ. Sed en tiu sama parolado Zamenhof ankaŭ diris (citis s-ro Becker): "Esperanto troviĝas inter du polusoj, A. La registaroj, B. La civitanoj. La registaroj povas oficialigi Esperanton nur post kiam la civitanoj lernis la lingvon, la civitanoj nur inklinas lerni la lingvon post kiam ili vidas la utilon en la ĉiutaga internacia vivo." Nenio nova do, diris s-ro Becker.

En la dimanĉa posttagmezo ni elektis ĉeesti la protestantan diservon. Predikis pastro Gerd Brinkman el Germanujo kaj asistis pastro Wayne Duffield el Usono. Partoprenis nur 80 personoj, eble ĉar la posttagmezo estis sunbrila kaj varma kaj eĉ en la preĝejo estis tro varme. (Gi ne estis tiel bone klimatizita kiel estis ĉiuj ejoj kaj ĉambroj de Hotelo Hilton, kie ciam regis agrable konvena temperaturo.) Sed mi aŭdis poste ke en la katolika diservo, okazinta tuj poste en alia preĝejo, ĉeestis jam pli ol du cent personoj. La budhistoj ankaŭ havis diservon, laŭ raportoj tamen nur tre malmultaj tie partoprenis. Sed pli malfrue dum la semajno OOMOTO, la aparta japandevana religia movado, kolektis 70 personojn en tre interese kunvenon sub prezido de Prof. Hino. Okazis tie meditado laŭ Oomoto-maniero, du paroloj, lumbildoj kaj tuĉ-pentrado, en amika kaj ĝoja etoso. — Kompreneble ankaŭ KELI kaj la katolikoj havis siajn kunvenojn dum la semajno.

El la vesperaj programoj mi volas aparte mencii tri, la Usona Vespero, la Internacia Vespero kaj la Teatra Vespero. La Usona Vespero okazis jam dimanĉe en la plenplena salono Zamenhof, la granda kunvensalono dum la kongreso, kaj malgraŭ ke mi poste aŭdis kritikojn pri kelkaj programoj mi estis tre kontenta kaj mi opinias, ke oni prezentis bonajn kaj karakterizajn ekzemplojn el la usona kulturo. Komence grupo da indianoj okupis la scenejon, prezentante siajn dancojn en tradiciaj kostumoj ornamitaj per plumoj, konkoj ka sonoriletoj. Granda tamburo kaj a-a-a-j kantado celis krei genuinan etoson. Certe ili ankaŭ sukcesis redoni ion el ilia malnova kulturo, tiom kiom eblas en mĉerna salonego inter amaso da homoj el la 20-a jarcento. Speciale fortajn aplaŭdojn ricevis eta



William Auld gvidis la Internacian Vesperon.

knabo kiu same serioze kiel la plenkreskuloj partoprenis la dancmovojn. "Dr. Corn's Bluegrass Remedy" estis grupo de ses knaboj, kiuj per "siaz du-tri gitaroj, violono kaj apartaj instrumentoj enportis en la salono la etoson de la usona pejzaĝo, kiam tra ĝi rajdis tagnokte lacaj rajdistoj, kies konsolo kaj ripozo estis la sono de la ritma kanto, ofte banaligita en diversaj sub-kvalitaj western-filmoj". (Mi permesis al mi citi el la artikolo de s-ino Lapenna en la Gazetara Servo de la Kongreso). Post multaj aliaj bonaj eroj venis fine sur la scenejon la Maranatha ĥoro, religia ĥoro konsistanta plejparte el nigruloj. Iia prezentado estis granda travivaĝo, la absoluta kulmino de la vespero. Estas ja konate, ke nigruloj ŝajnas havi apartan senton por ritmo kaj muziko.



La plej juna kongresano.

En ilia kantado, riĉe nuancita, lertegge kunordigita, elradiis ilia profunda kredo, ilia tuta prezentado estis vere vivanta, la kantado portata de genuinaj sentoj. Tute senkonsidere kiel oni rilatas al religio kaj kiun vivkoncepton oni havas oni estis kaptata de tiu majesta muzika prediko. Vere granda arto!

La Internacia Vespero en la lundo gvidis William Auld. Unue mi estis iom skeptika, ĉar granda poeto kaj lingvisto ne necese havas la kvalitojn por gvidi programon, kiu devas esti samtempe kultura kaj distra. Auld havas! Sprite, ŝerce, li lerte prezentis la diversajn programerojn, tamen sen troa emfazo de sia propra rolo. Fakte, mi aŭdis, oni kreis tiun tutan programon el preskaŭ nenio en la lastaj du-tri tagoj, kiam oni eksciis ke i. a. la pola aktoro Nikolaj Rytjkov ne povis alveni. Kvankam ne ĉiuj eroj levigis al la nivelo de tiuj de la usona vespero oni mirinde bone sukcesis. Tirolaj dancoj, japanaj dancoj, deklamado de poemoj, lertega jodlo-kantado de juna amerikanino svisdevena, Lisa Ward, estas memorindaj programpunktoj. Je muziko de D-ro Balcar s-ro Auld mem deklamis kelkajn malnovajn esperantajn poemojn. Tre interesa estis la teatraĵo "Amforo" de Emilja Lapenna. Tiu devas esti facile prezentebila en simplaj cirkonstancoj. Parolas la amforo (laŭ PIV: antikva alta botellego el argilo kun pinta bazo kaj du teniloj por konservi vinon, oleon ks) kaj tiu voĉo estas sonbendigita. La du aktoroj nur bezonas iom moviĝi, iom gesti, sed ili estas nur flankaj figuroj en tiu teatraĵo. Almenaŭ en tiu kadro: la granda malhela salono, kun malmulta lumo centrigitaj je la blankvestitaj aktoroj kaj ilia amforo, la verkaĵo forte impresis.

La Teatra Vespero, okazinta en la teatro de la ŝtata Universitato de Portland, estis por mi kaj certe por la granda plimulto de la publiko granda travivaĝo. Anstataŭ la geaktoroj de la Pola Esperanto-Teatro, kiuj ne povis veni, oni sukcesis lastmomente havigi Lord's International, la pupteatro de David Lord. Unu sola homo, lerta virtuozo kaj aktoro, kaj liaj pupoj tute ensorĉis la publikon. Mi denove ĉerpas kelkajn frazojn en la Gazetara Servo kun Emilja Lapenna: "Unue el la kurteno — riĉa pupteatra scenejo, ornamita per multaj flagoj, eksonis la melodio de la usona himno, tuj poste aŭdiĝis la sonoj de la bela muzikaĵo de Stravinski Fajrobirdo. La pupoj bunte kaj brile vestitaj, movigitaj per fadenoj, fakte ilustras la muzikon. Parolata teksto ne ekzistas." — Poste sekvis ankaŭ "Pariza submondo" kun muziko de Offenbach kaj "Capricio Espagnol" de Rimsky-Korsakov. Mi neniam vidis ion similan kaj mi neniam forgesos tiun vesperon.

Kaj pri la laboroj de la kongreso? Jes, certe multon mi povus diri pri

la diversaj kunvenoj, fakaj kaj ĝeneralaj, sed kiel dirite aliaj revuoj raportas pri ili. Tamen kelkaj mallongaj komentoj. La debato pri "La valoro de fremdlingva instruado en la lernejoj" estis ja interesa, sed al mi ŝajnas ke iel oni ne sukcesis atingi la kernon de la problemo. Oni konstatis ke la nuna situacio estas ĥaosa, ke la instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj de diversaj landoj ne donas la rezultojn, kiujn oni atendis. Oni konstatis ke en Usono kaj aliaj landoj la studentoj protestas kontraŭ la lernado de fremdaj lingvoj kaj deziras forigi ĝin el la instruado por havi pli da tempo por aliaj temoj. — Jes, sed ĉu tio validas ankaŭ por la malgrandaj ŝtatoj, Svedujo, Danlando, Finnlando? Ĉu tio ne estas nur atesto pri kredo je la supereco de la propra nacia lingvo, speciale en Usono? — Kaj kiam aliaj parolantoj asertas, ke "el la vidpunkto ke la lernado de fremda lingvo devus doni eblecon de komunikado kaj scio de la kulturo de la fremda lando la instruado tute ne sukcesas" ili certe pravas, sed ili pretervidas gravan fakton: almenaŭ en la malgrandaj landoj oni devas lerni fremdajn lingvojn pro ekonomiaj kaŭzoj. Sveda komercisto kiu deziras eksporti siajn varojn al Germanujo devas scii alian lingvon, prefere la germanan. Li ne povas atendi ke liaj germanaj klientoj intertraktu kun li en la sveda. Kaj estas ankaŭ nedisputebla fakto ke Esperanto ankoraŭ malmulte utilis al li. Ni devas tamen akcepti la problemojn kiaj ili estas!

Mi scivole faris mallongajn vizitojn je la kunvenoj de la TEJO-junularo. Ilin ĉeestis 30-o da personoj (TEJO ja havis aliajn aranĝojn en Eŭropo). En unu kunveno oni diskutis pri rezolucio, tre vigle, ĉar la prudentaj amerikanoj ne volis akcepti la idealisman tekston kiun proponis la francoj. Je alia oni kolektis kaj provis traduki blasfemojn en Esperanton, kaj eĉ decidis kompili fakvortaron. Tiu kunveno estis amuza, kaj la blasfemoj certe formas gravan parton de la lingvoj. Tamen oni ne povas ne demandi ĉu gejunuloj je Universala Kongreso ne povas trovi pli gravajn temojn por diskuti.

En unu vespero s-ro Nassif Isaac prezentis prelegon pri "Moderna kaj antikva Egiptujo". Li montris tre belajn bildojn, sed la programo estis grandparte fuŝita pro iu teknika eraro je projekcia aparato (kial ne kontroli antaŭ la komenciĝo?), kaj almenaŭ mi estis atendinta ion alian ol ordinaran priskribon de kutimaj turismaj vidindaĵoj kiam nun tamen parolis al internacia publiko egipto loĝanta en Aleksandrio.

La oficiala bankedo en la vendreda vespero ankaŭ ne estis tute kion oni povus atendi. Ja bongustaj estis la manĝaĵoj, servitaj laŭ usona bufeda sistemo kiu iom similas al nia "smör-



TEJO-anoj diskutas.

gåsbord", sed la tempo dediĉita al ĝi (du horojn) estis tro mallonga, ĉar oni devis longe atendi en vicoj antaŭ ol atingi la pladojn. Kaj la prezo ankaŭ ŝajnas al mi sufiĉe alta (7:50 dolaroj) ĉar por tiu prezo oni ricevis same bonkvalitan manĝon en la ordinara restoracio de Hotelo Hilton. Sed sendube LKK faris kion eblis pri tiu aranĝo. — Poste sekvis en la sama salonego la balo, kaj tiam eblis sidi trankvile ĉe rondaj tabloj kun trinkaĵoj (se oni ne preferis ĉiam danci). Do, tiu vespero finiĝis en agrabla maniero.

Antaŭ tiu vendredo estis ekskursiva tago, la jaŭdo. Ni elektis ekskurson aŭtobusan al la neĝkovrita monto Hood kaj reen laŭlonge de la Columbia rivero. Ĉar mi kolektis miajn impresojn pri Portland kaj Oregon por aparta artikolo, mi ĉi tie nur volas konstati, ke tiu ekskurso estis tre sukcesa kaj la vetero perfekta. La vetero cetere estis tre bona dum la tuta semajno, kvankam oni asertis, ke ni trovigas en regiono kie kutime multe pluvas.

Por la sabato restis nur la Solena Fermo. Ĉiam regas iom melankolia sento je adiaŭo. Sed multaj esperis pri venontjara nova renkontiĝo dum la Universala Kongreso en Beograd, la 58-a.

En tiu ĉi raporto mi multon intence forlasis kaj verŝajne multon forgesis. Pri unu afero mi tamen fine menciuj: la organizado de tiu kongreso estis tre bona. Mi fakte apenaŭ aŭdis iujn plendojn. La kunvenoj komenciĝis je la ĝustaj horoj, la ekskursaj aŭtobusoj foriris ĝustatempe, la prelegoj de internacia Somera Universitato (mi intence ne raportis pri ili, sed kiel kutime ili estis tre altkvalitaj) okazis en ejoj facile troveblaj; koncize, ĉio funkciis. Tamen mi nun bone komprenas, ke la lokaj organizantoj kaj s-ro Nevan, la KKS, havis multajn mal-

facilaĵojn.: la distanco al eŭropaj landoj estas longa, lastmomente montriĝis ke aktoroj kaj prelegantoj ne povis alveni kaj oni devis trovi anstataŭantojn ktp. Tamen ili bonege sukcesis kaj — kiel mi komence diris — bonege utiligis la okazon por informi pri Esperanto. Kaj ni kiuj venis tien, ni havis neforgeseble belan kaj interesan semajnon!

Ake Blomberg

RADIOKURSO POR AFRIKO

TEJO — Tutmonda esperantista junulara organizo — preparas Esperantokurson per radio por afrikaj landoj. La gvidantoj de TEJO opinias, ke tio estas la sola ebleco konkeri por Esperanto tiun kontinenton. Por ebligi la aferon oni petas pri financa helpo. Oni ĝiru rekte al UEA, konto nro 25.52.89.804 ĉe Banko Mees et Hoop en Rotterdam, la kontribuojn. Menciuj klare la celon: Radiokurso de Afrika Komisiono de TEJO.

Tiu celo certe estas tre grava kaj la redakcio de La Espero ĝin forte rekomendas.

S.A.T.-KONGRESO EN KUOPIO

Sukcesan kaj multflankan kongreson organizis la loka klubo "Lingvoponto". Preskaŭ 400 partoprenantoj el 20 landoj. La loka gazetaro tre favore raportis, ĉiutage aperis novaĵoj pri mondaj okazintaĵoj en Esperanto. Sufiĉe multajn efikojn ni vidis pri la aranĝoj ankaŭ en la tutlanda gazetararo. Gratulon al la organiza kvaropo kaj al ĝiaj helpantoj.

J. A.

IMPRESOJ PRI LA KONGRESLANDO



Indianaj dancistoj ĉe la UK.

Ni estis forlasintaj Kastrup, la flughavenon de Kopenhago, je la 12.30 kaj alvenintaj en Seattle je la 14-a (pro privataj kaŭzoj mi ne povis utiligi al mi oferton de UEA pri la karavana vojaĝo). Komprenoble, ni flugis okcidenten kaj gajnis tempon, sed tamen... en malpli ol 10 horojn ni transflugis Atlantikon, Grenlandon kaj Kanadon kaj alvenis en la flughavenon de tiu urbo en la nordokcidenta angulo de Usono, tuj apud la limo de Kanado. Ni estis plenaj de admiro pri la neimageblaj triumfoj de la tekniko, kaj nun... jes, nun ni troviĝas en la lando de plej evoluinta tekniko de la mondo, en la lando de komputeroj, aŭtomobiloj, aeroplanoj kaj lunveturiloj.

Ni enviciĝis ĉe la ĝicetoj de la pasportkontrolo, por renkonti la unuajn reprezentantojn de tiu popolo de teknikistoj. Tiam okazis! Dormema kontrolisto estis ekzameninta mian pasporton, eliris tirkesteton de lia tablo, serĉis ion, kaj foriris en alian ejon longe for. Post sep minutoj li revenis kun eta altenigilo, ordinara simpla aparato de la speco kiun oni uzas en oficejoj por kunfiksi paperfoliojn. Li volis fiksi tiun etan kontrolkarton, kiun oni ricevas enveturante en Usonon, je mia pasporto. Li metis la pasporton kaj la karteton je la ilon kaj... klik!... Ne funkcias! Li forgesis ŝarĝi la aparaton kun la metalfiksiloj. Nova sep-minuta promenado al tiu fora ejo kaj reveno kun la fiksiloj!

Tiu epizodo estas tipa almenaŭ por miaj spertoj en Usono, spertoj jam dum pli frua vizito, nun dum la kongresa semajno kaj poste dum kvarsemajna veturado tra la kontinenton ĝis la Atlantika bordo. Tiu miksaĵo de la plej alte evoluinta tekniko kaj iuspeca senzorga primitiveco! Oni strebas al la plej efika eluzo de ĉiu sekundo de la multekosta TEMPO — kaj perdas tempon je ridinde malgravaĵaj bagatelajoj. Kial? Eble ĉar — feliĉe — la homo eĉ en la aĝo de la tekniko restas... homo!

Sed, mia intenco estas, ke tiu ĉi artikolo donu bildon de la kadro ĉirkaŭ la 57-a UK, bildon de la urbo Portland kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Estas avantaĝo, certe, ke la urbo Portland ne apartenas al la vere grandaj usonaj urboj. En New York, Washington aŭ Chicago oni apenaŭ rimarkus nin, sed en Portland oni vere atentis. Tamen Portland estas, ŝajnas al mi, sufiĉe tipa usona urbo. Kiam oni alproksimiĝas oni vidas jam de malproksime la konatan silueton, la aron de "aluminiumskatoloj" starigitaj unu apud la aliaj, ne tiel altaj kiel tiuj de New York, sed sufiĉe altaj por savi la memfidon de la urbanoj. Ekster tiu centro, kvartaloj kun stratoj kiuj rememorigas eŭropanojn pri la "wild-western"-filmoj; diverskoloraj domoj kun butikoj, kies ofte grandegaj sildoj evidente rajtas aspekti kiel ajn, kaj kiujn oni lokigas kie ajn, kiel ajn, kaj gran-

da ĥaoso da telefonaj dratoj, libere pendantaj inter longaj vicoj da fostoj (en okcidenteŭropaj urboj kaj vilaĝoj la dratoj ja ĝenerale troviĝas kaŝitaj sub la pavimo de la stratoj). Je la eksteraj randoj de la urbo vastegaj teritorioj kun unufamiliaj domoj, plej ofte el ligno, ĉirkaŭitaj de bele prizorgataj ĝardenoj. Estas la revo de la plej multaj usonanoj vivi en propra domo, kaj ŝajnas ke ĉiuj havas eblecon efektiviĝi tiun revon.

Portland estas tipa ankaŭ rilate al la stratnomoj; multaj stratoj estas numeritaj laŭ certa sistemo: unua avenuo sudokcidenta, dua avenuo sudokcidenta ktp., tiel ke fremdulo facile lernas kie li troviĝas en la urbo kaj en kiun direkton iri por veni al la centro. La ĉefnirejo de nia hotelo kaj kongresejo Hilton estis ĉe la Sesa Avenuo Sudokcidenta, kaj je la kontraŭa flanko de la granda vestiblo estis elirejo al la strato Broadway (Larĝa Vojo). Ŝajnas ke ĉiu usona urbo kun memfido havas sian Broadway, kaj same kiel en New York situas tie la kinoj, variteoj kaj dancrestorioj. Ĉu oni intence amasigas ĉiujn pekejojn ĉe la "Larĝa Vojo"?

Tie en la centro troviĝas multaj grandaj magazenoj, sed se oni vere volas butikumi oni veturu al komerca centro je la eksteraĵo de la urbo. En Portland ĝi nomiĝas Lloyd Center kaj estas facile atingebla per aŭtobusoj. Tiu centro estas tre luksa kaj moder-

na. La butikoj kaj magazenoj troviĝas ĉe belaj stratoj centrigitaj ĉirkaŭ granda placo kun plaĉaj verdaĵoj, eĉ la stratoj plejparte sub plafono en grandega konstruaĵo. Tie amasiĝas la homoj je ĉiu horo. Mi neniam kontrolis, sed je la rando de la centro troviĝis ŝildoj, kiuj informis "Malferma dum la tuta nokto". Tio estas servo, ĉu ne?

Parolante pri butikoj, la sistemo de kredito ŝajnas esti alte evoluita en Usono. La aĉetanto montras sian kreditkarton kaj lia persona konto estas debetata por la aĉetita varo. La butikistoj ĉiam demandis ĉu ni volas pagi kontante aŭ kredite, multfoje eĉ nur: "Kiun konton ni debetu?" Iufoje ni eĉ spertis, pagante kontante, ke la magazenaĵ vendistinoj tre konfuziĝis kiam ili devis ŝanĝi 10-dolaran monbileton. Kunigante monon el du kasoj kvar vendistinoj post multe da kalkulado kaj interkonsiliĝo fine sukcesis solvi la evidente grandan problemon. Ne, mi fakte ne troigas! Tio vere okazis, tamen ne en Portland.

En tiu urbo ni tre bone vivis dum la kongresa semajno. Manĝon oni facile trovis en diversaj restoracioj. Ĉu altaj prezoj? Ne, por svedo fakte ne. En tiuj popularaj restoracioj por memservado, kiuj similas al niaj "mjölkbar" kvankam tie ĉiuj manĝaĵoj de la menuo, eĉ la varmaj, troviĝas tute videblaj sur la longaj servotabloj, tiel ke eksterlandano sen lingvoscio nur per fingromontro povas ricevi de la servistinoj la deziratan pladon, en tiuj restoracioj oni povis havi abundan lunĉon aŭ tagmanĝon por 2,— ĝis 2: 50 dolarojn, kaj matenmanĝon — ekz. ovojn, tri pecojn da bongusta "bacon", rostitan panon, orangosukon kaj kafon — por 1: 25—1: 50. Iom pli altaj prezoj ol en Svedujo verŝajne (unu dolaro egalas al sv. krj 4: 75), sed ne tiel ege altaj, kiel oni ofte imagas al si ĉi tie. Sed kompreneble por esperantistoj, kiuj venis el landoj, kie la prezoj ĝenerale estas multe pli malaltaj ol en Svedujo, estis tute alia afero. — Por bongusta supeo en ekzemple la pli luksa restoracio de Hotelo Hilton, kun iom da alkoholaĵoj, oni tamen ne pagis pli ol ĉirkaŭ 7-8 dolarojn. Komparu tion kun niaj prezoj en unuaklasaj restoracioj! — Sed pli poste ni ja spertis, ke pri la prezoj por ĉambroj en hoteloj estas tute aliel. Ili estas tre altaj en Usono (almenaŭ se oni antaŭmendas pere de vojaĝoficejoj) kaj se oni longe restu tie oni devas fidi al la gastameco de parencoj aŭ gekonatoj.

Ĉi tie mi fakte sentas min devigita laŭdi la usonan manĝon. Tiaj bifstekoj kaj tiaj "hamburgers" ekzistas en neniun alia lando de la mondo, kaj aldonu al tio, ke oni ĉiam ricevas multe da salado kaj multe da freŝaj, bongustaj legomoj. Freŝan, delikatan fiŝon oni ankaŭ trovas en preskaŭ ĉiuj restoracioj, almenaŭ en la ŝtatoj ĉe la marbordo. Sed kiam mi entuziasme



Hotelo Hilton — La Kongresejo.

laŭdis la usonan manĝon iun tagon en interparolo kun francino, ŝi malesteme rigardis min sen diri ion. Por postulemaj francoj la rapida usona maniero de manĝopreparado eble estas barbarismo.

Ĉi tiuj ŝtatoj ĉe la norda bordo de la Pacifiko tre diferencas de la dense loĝataj regionoj en la oriento, ĉe la Atlantiko. Ĉi tie en la nordokcidento la urboj estas pli malgrandaj kaj en ili eĉ eblas spiri sen samtempe enigi en la pulmojn amason da vivdanĝeraj benzingasoj kaj aliajn malpuraĵojn. Almenaŭ mi tiel imagas. La ĉirkaŭanta pejzaĝo eĉ similas al grandaj partoj de Svedujo: montoj, pinarbaroj. Kaj ĉe la horizonto oriente oni ĉiam vidas la eterne neĝkovritajn pintojn de la montoj, apartenantaj al tiu potenca longa spino da montoj, kiu disigas la mallarĝan bordostriion apud la Pacifiko de la vastaj ebenaĵoj en la centraj partoj de la kontinento. La portlandanoj diras, ke ofte pluvas en ilia urbo, kaj tion mi povas kompreni, ĉar kiam la nuboj de la Pacifiko renkontas tiun montomuron, ili faligas tiun akvon kiun bezonus la ofte dezertaj ebenaĵoj je la alia flanko. Sed dum tiu kongresa semajno falis eĉ ne unu guto da pluvo — almenaŭ mi ne rimarkis iun. Tute male, la suno brilis ĉiun tagon kaj estis tiel varme, ke oni preferis resti endome — en la bonege klimatizitaj ĉambroj kaj salonoj — antaŭ ol vagi en la stratoj. Tial ni, kiuj el la diversaj tuttagaj ekskursoj elektis tiun al Monto Hood, sentis nin vere feliĉaj, ĉar la aŭtobuso veturis tiel altan, ke ni je la unua halto povis vagi en neĝo.

Reveturante ni ĝuis la grandiozan pejzaĝon de la valo de la Columbia-rivero, tiu potenca rivero, kies fontoj troviĝas en Kanado kaj kiu estas utiligata por lignotransportado same kiel niaj nordlandaj riveroj. Ĉi tiu ja vere estas la arbarregiono de Usono, kaj ĉiu lignajisto konas la mondfaman pinon, Oregon Pine. Portland ce-

tere situas ĝuste kie alia rivero, Willamet, elfluas en la riveron Columbia, kaj la vasta valo tie estas ege riĉa terkultura regiono.

Oni troviĝas ĉi tie en regionoj kiuj estas junaj se oni nur konsideras la okcidentan civilizon. Nur antaŭ iom pli ol jarcento vivis tie ĉi la indianoj sufiĉe neĝenataj, nun ili jam preskaŭ tute malaperis same kiel ilia aparta civilizo. La historio de Usono ja kaŝas grandajn tragediojn, kaj la bataloj por la ekzistado en la "sovaĝejo" verŝajne pli forte influis la vivkoncepton kaj karakteron de la modernaj usonanoj ol ni en la "Malnova mondo" imagas. Tiu ĉi estas stranga nacio: tre granda nombro de la nuntempaj usonanoj naskiĝis en alia loko en alia lando longe for, kaj eĉ tiuj kiuj ja naskiĝis en Usono ofte — en tiu ĉi parto verŝajne eĉ plejofte — havis gepatrojn aŭ geavojn, enmigrintaj el aliaj mondpartoj. Ke kreiĝis el tiu granda, ĥaosa miksaĵo unu nacio, kun nacia sento kiu kunigas, tio estas vere interesa historia fenomeno. Por kompreni la homojn tie necesas pripensi tiun unikan originon de la ŝtato kaj ĝia kulturo.

Hodiaŭ la distancoj malpligrandiĝis — konstato tiel ofte ripetita ke ĝi ŝajnas jam banala — kaj Usono ne plu estas iu mistera lando longe for. Ĝi troviĝas proksime al ni, ĝi havas gvidan rolon sur la monda scenejo, ni scias pri ĝiaj problemoj, sociaj, rasaj, mondpolitikaj, kaj ni ofte ilin vigle diskutas. La Espero estas neŭtrala gazeto. Pri tiuj certe gravaj demandoj ni diskutu en aliaj forumoj. Sed por la partoprenantoj de la 57-a UK en Portland la gastameco, afableco kaj helpemo de la esperantistoj tie estas nediskutebla. Kaj almenaŭ mi spertis, dum ankoraŭ kvar semajnoj en diversaj lokoj, ke tiu gastameco kaj afableco estas karakteriza trajto de vastaj rondo de la usona popolo. Mi tre volonte revenos tien.

Ake Blomberg

LA REDAKCIO

denove forte emfazas ke manuskripto por La Espero devas esti klare tajpitaj kun duobla linia interspaco kaj larĝaj marginoj. Skribu nur sur unu flankon de la papero. Se vi skribas erare kaj poste korektas, bonvolu fari la korektojn absolute klare. Bonvolu memori, ke la kompostisto ne estas esperantisto kaj ke la redaktoro ne havas tempon tajpi mane skribitajn manuskriptojn. Tiaj manuskriptoj ĝenerale ne aperos!

Kiel sablo seka

S. A. Jacobsson

*Perforte volas mi la nunon teni
ĉe mi se ardas en feliĉ-moment,
memorojn voki el la for reveni
por pacon doni al sopira sent.*

*Sopiri ĉion sed nenion trovi,
jen vivo pala de brulega kor,
atendi ĉiam kaj konstante movi
la pensojn lace ĉirkaŭ revoŝlor.*

*Feliĉe formi en ĉi mondo peka
la vivon, penas mi en plena van,
ĝi pasas grize kiel sablo seka
fluante spite el retena man.*

Aperis en *La Espero* nro 4,
aprilo, 1942

NACIO ESPERANA

Dankon Sven Jönsson pro via komento pri la rubrika temo: En la embria periodo de Esperanto Zamenhof ne konigis sian ideon. Li estis juna kaj povis dediĉi sian tutan vivon al la afero. Bedaŭrinde mi ne rilatas same al mia ideo. Mi ne havas la necesan forton mem batali por ĝi — mi volis nur konigi ĝin al la esperantistaro. Post la naskiĝo de la ideo mi ne hezitis eĉ unu sekundon pri ĝia ebleco de realigo. Mi vidas en ĝi la plej grandan eblecon por progresigi nian aferon. Tamen, eĉ en la vicjoj de la esperantistoj mem nestas multa konservativa malemo kaj kontraŭstaro. Oni ne kuraĝas elsalti la foruzitajn galoŝojn. Pro mia ideo kelkaj eĉ ektimis kiel alfrontante vipuron. Ekz. la redakcio de... nu, por ne kaŭzi duan ŝokon mi ŝparas la identecon — mi ja tamen ŝuldas al ĝi pro tre spontanea rido!

TIOM stulta mi tamen ne estas ke mi celus nuran, senperan proklamon de nacio. Tia afero estus nura domaĝo. Kompreneble la proklamo sekvos nur post jaroj de bonintenca subfosado, propagando, koridora diplomatio, intertraktadoj, grandega organiza laboro ktp. ktp. Kaj dume la cirkonstancoj sendube maturiĝos por la realigo. Kontraŭe al la koncepto de certa redakcio (silento denove!) mi estas konvinkita ke Zamenhof mem laŭ la aktualaj kondiĉoj benus la aferon.

S. A. Jacobson

★

Li: Ĉu fakte mi estas la unua viro, kiun vi amas?


Ŝi: Certe, mia kara. Vi viroj ĉiuj demandas la saman.

★

Li: Mia raztranĉilo neniom tranĉas.

Ŝi: Ne provu kredigi min ke viaj barbostoploj estas pli malmolaj ol la linoleumtapiŝo.


FILO DE SINHA EN SVEDUJO



La bildoj montras du filojn de Lakshmiswar Sinha, por malnovaj svedaj esperantistoj tre konata hinda esperantisto kaj amiko al Svedujo. La supra bildo montras **Animesh Sinha**, 23-jarulo, kiu ĵus nun studas kaj laboras ĉe SCA en Timrå apud Sundsvall. Salutojn al li sendu al sr-o Farm, Ludvigsbergsvägen 37, 852 34 Sundsvall.

Sube estas Nihilis Sinha, 20 jara, kiu troviĝas en Japanujo. Ĉe Ocmoto, Kamicka 621, Kyoto-ku Japanujo.

Ilia patro tre ĝojos, se liaj malnovaj geamikoj en Svedujo sendos salutojn al ambaŭ filoj, kiuj bone lernis nian lingvon de la patro sed kiuj ne havis okazon uzi ĝin kaj do ankoraŭ estas neceptaj.



★

Li: Mi esperas fraŭlino Rozalio, ke vi ne trovas miajn vizitojn malagrablaj?

Ŝi: Tute ne. La malagrablaĵo de via veno estas plene kompensata de la ĝojo, kiun mi sentas ĉe via foriro.

En la libro "Från morgonstillhetens land" de la fama sveda esploristo **STEN BERGMAN** ni trovis la jenan rakonton:

Iun tagon vizitis min japana esperantisto Ootani. Esperantistoj ĝenerale tre entuziasmiĝas pri sia lingvo, sed neniam antaŭe mi renkontis similon de Ootani. Li deklaris ke esperanto estas lia religio, kaj post mallonga interparolo kun li mi tute konvinkigis pri tio. El japanaj gazetoj li spertis ke mi loĝas en Shuotsu. Tial li alveturis kaj kunportis ekzempleron de mia libro pri Kamĉatka, la esperanta eldono aperinta en Stokholmo, kaj li celis nun provizi tiun libron per mia nomskribo. Facile mi ja kontentigis tiun deziron, sed krome li kunportis multobligitajn salutkartojn por trideko de liaj amikoj en Japanujo kaj Koreo, kiuj laŭ lia scio posedas esperantan ekzempleron de la Kamĉatka-libro. Li deklaris ke ili kun plezuro akceptus mian nomskribon por alĝui ĝin en la libroj; tial li aranĝis specialan, enkadritan lokon por mia nomskribo sur ĉiu karto. Sensuspekte mi cedis al lia insista peto kaj surskribis la kartojn.

La rezulto estis terura. Antaŭ forpaso de semajno mi ricevis tridek leterojn de sama nombro da estuziasmaj esperantistoj, ĉiuj dezirante korespondi kun mi. Mi konfuziĝis kaj petis ke Ootani multobligu la definitivan informon ke mi ne estas esperantisto. Sed lia granda entuziasmo malpermesis al li tion fari. Anstataŭ li mendis el Svedio svedan lernolibron de esperanto kaj sendis ĝin al mi kune kun esp.—angla leksikono, esperante ke mi lernu la lingvon por estonte korespondi kun la tridek esperantistoj kaj kun li mem. Estis preskaŭ emocie sperti tian entuziasmon.

Kompreneble Ootani ankaŭ ĉiam portis la verdan esperanto-stelon, sed tio neniel estis al li sufiĉe ĉar la esperantistoj elektis por si la verdan koloron de la espero, li portis ankaŭ verdajn vestojn, verdan kravaton kaj uzis verdan inkon en sia skribilo.

Li korespondadis en esperanto kun la tuta mondo kaj havis amason da leteroj kaj poŝtkartoj de svedaj esperantistoj. Unufoje mi vizitis lin en lia hejmo en la urbo Seishin, kaj mi trovis lian hejmon vere stampita de esperanto. La murojn ornamis grandaj portretoj de Zamenhof, la aŭtoro de esperanto. Inter alie troviĝis tie la esperanta eldono de Gösta Berling kaj de la libro pri Andréo.

La entuziasmo de nia japana samideano certe estis sincera kaj bonintenca, sed ni ne rekomendas al la nuntempaj esperantistoj tiel agi.

La redaktoro

Junulara konferenco pri europa sekureco ignoras lingvan problemon

Ok membroj de TEJO estis ree en Dipoli, kie en 1969 okazis la Universala Kongreso. Krom ili estis tie ankaŭ ĉirkaŭ 400 aliaj gejunuloj, reprezentantoj de 12 internaciaj junularaj organizoj el orienta kaj okcidenta Eŭropo.

Inter la 26a kaj la 31a aŭgusto okazis en Helsinko Junulara Konferenco pri Eŭropa Sekureco. Kion TEJO faris tie?

TEJO estis tie kiel unu el la internaciaj junularaj organizoj. Ĝi partoprenis, same kiel la aliaj, en la preparlaboroj por la konferenco (en parseminarioj en Norvegio kaj Pollando). Ĝi estis tie je la sama nivelo kiel Junaj Socialistoj, Ekumena Junularo, Kristanaj kaj Konservativaj Studentoj, Junaj Liberaloj ktp. Ĝi estis tie por diskuti la problemojn de sekureco en Eŭropo kaj proponi solvojn.

Estis grave, ke TEJO partoprenu en tiu konferenco. La delegitoj en ĝi estis la gvidantoj de junularaj organizoj. Partopreno signifis kontakton kun tiuj gvidantoj. Kontakto signifis diskutojn kun ili pri la problemoj, kiuj plej interesas TEJO: lingvo kaj kulturo. Partopreno signifis eblecon influi la laboron de la konferenco. Estis tio ĉi unu el la plej gravaj konferencoj, kiujn la junularaj organizoj eŭropaj havis. Certe la plej grava, al kiu iam TEJO partoprenis.

La laboro en la konferenco estis peza. Oni parolis en ĝi en kvar lingvoj (TEJO uzis la kvinan — Esperanton) kaj interpretis inter ili. La partoprenantoj estis parolemaj. Iliaj opinioj ofte neniel koincidis. Eblis tamen je la fino trovi komunan platformon kaj la konferenco feliĉe finis.

La TEJO-delegacio partoprenis en ĉiuj laboroj, kontribuis kelkajn paroladojn kaj je la fino skribe protestis.

TEJO protestas

"Ni sentas nin devigataj ripeti, ke ŝajnas nekredible, ke la dua komisiono, kiu mencias internacian kunlaboron en preskaŭ ĉiu alineo de sia raporto, trovis konvene ignori la lingvan

problemon. TEJO ripetas, ke ĉi tiu konferenco substreku, ke adekvata internacia kunlaboro ne povas okazi sen solvo de tiu problemoj. Ni postulas, ke oni klare menciu tion en la raporto de la dua komisiono, ĉar ĝi sendube estas problemoj, kiun ĉiu partoprenanto en ĉi tiu konferenco sentis en iu alia maniero. Ignoro de ĉi tiu problemoj (problemo rekonita kiel tia de UN) estas egala al ignoro de unu el la plej grandaj problemoj, kiujn la junaj homoj en Eŭropo frontas ĉiun fojon, kiam ili transiras nacian limon."

Ni havis kaŭzon esti malkontentaj. Jam en la enkonduka parolado en la pleno de la konferenco Tomas Jansson, vicprezidanto de TEJO, atentigis la partoprenantojn pri la lingva problemoj. En sia esperantlingva parolado, interpretita en la anglan, francan, rusan kaj germanan li diris i. a.:

"La eŭropa sekureco dependas el alta grado de la justeco en interŝtataj kaj intergrupaj rilatoj. Socio, kiun karakterizas rilatoj de subpremo kaj diskriminacio estas politike malstabila, kaj daŭre ekestos luktoj kaj protestoj en ĝia sino. Tio validas kaj por la socio interne de la ŝtatoj, kaj en la internacia socio, t. e. inter la apartaj ŝtatoj.

Respekto de ĉiuj homoj

Stabileco kaj sekureco havas kiel radikojn la respekton por la intereso de ĉiu homo en ĉiuj liaj reciprokaj rilatoj."

"TEJO laŭ sia naturo okupiĝas pri la kultura aspekto de la potencrilatoj. Ĝi klopodas forigi el la internaciaj rilatoj la uzon de la lingvo de superregaj ŝtatoj, tiel forigante pikilon el la misuzo de kulturo kiel aspekto de superregado.

En malgranda lando, sub politika influo de iu grandpotenco, homoj pro-



Bojka Batalska, Bulgario, Ulrich Brandenburg, FR Germanio, Tomas Jansson, Svedujo, Gary Micke, Usono, Geoffrey Sutton, Britio, Franko Luin, Svedujo, Ingrid Maier, FR Germanio, Ulla Luin, Svedujo.

pravole lernas la lingvon de la grandpotenco. Tiu lingvo signifas por ili prestiĝon kaj profiton, ekonomie, science k. t. p. La kono de tiu lingvo ankaŭ signifas pluan kontakton kun la koncerna fremda kulturo, kaj pluan influon de la fremda kulturo al la propra kulturo."

"Oni povus kredi, ke tiu evoluo estas nur hazarda, sed tiel ne estas. Usono kaj Britio efektive klopodas disvastigi la anglan lingvon en ĉiujn landojn de la mondo. Ke ili ne faras tion el pura idealismo estas memklara. Sed eble helpas al ni kompreni la kaŭzojn de ilia agado mallonga citaĵo el la raporto de British Council, la brita organizaĵo por disvastigo de la angla lingvo kaj kulturo eksterlande, por la jaro 1968/69: 'Ekzistas kaŝita vendelemento en ĉiu angla instruisto, libro, revuo, filmo kaj televida programo, kiun ni sendas eksterlanden'.

Pri la samo konscias ankaŭ Francio, kiu sub nomo 'helpo al evolulandoj' listigas ankaŭ ĉiujn siajn klopodojn francigi — aŭ reteni francaj — siajn antaŭajn koloniojn. Do ne estas strange, se Francio havas surpapere tre belaspektajn statistikojn pri kvanto de evoluhelpo.

Politikaj kaj kulturaj avantaĝoj

Lingvo estas uzata kiel tre grava ilo por havigi al si avantaĝojn. Tion diras British Council tre klare en sia jam menciita jarraporto: 'Ni gajnas politikan, komercan kaj kulturalan avantaĝojn per mondskala uzo de la angla.'"

"En tiu ĉi konferenco ni diskutos en du komisionoj eŭropan kunlaboron kaj junularan agadon por sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo. Ni estas tie ĉi, ĉar ni apartenas al elito inter gejunuloj. Multaj partoprenantoj estis

TEJO (daurigo)

senditaj al tiu ĉi internacia konferenco, ĉar ili konas unu aŭ kelkajn fremdajn lingvojn. Malgraŭ tio ne povas senpere komuniki sed bezonas komplikitan teknikan maŝinaron kaj interpretistojn. La bedaŭrinda fakto ne estas, ke tiel estas, sed ke plej multaj el ni akceptas tion kiel ion naturan. La raporto pri European Youth Delegates' Conference, kiun ni ĉiuj ricevis inter niaj konferencaj dokumentoj, surhavas kiel ilustraĵon de internacia konferenco paron de aŭskultiloj, kvaŭzaŭ paro de aŭskultiloj estus la esenco de 'internacia konferenco'.

Se ni, la gvidantoj de junularaj movadoj, bezonas teknikajn helpilojn por interkomuniki, kiel interkomunikas tiuj, kiuj ne apartenas al tiu elito? Fingro-lingvo kaj balbutado estas nuntempe ĝenerale akceptataj. Sed ĉu tio kondukas al signifoplenaj interrilatoj kaj al kompreno? Senperan komunikadon neniu teknika helpilo povas anstataŭi, eĉ ne kiel same bona solvo. La demando restas nur, ĉu tiu senpera komunikado okazu en lingvo altrudita de iu aŭ iuj grandpotencoj, aŭ ĉu tiu senpera komunikado okazu en lingvo, kiu ne donu al la grandpotencoj la avantaĝojn, kiujn ili volas havi."

"Kultura superregado estas faktoro, kiu kontribuas al tensioj en Eŭropo kaj endanĝerigas la eŭropan sekurecon. Forigo de tiuj kulturaj superregaj tendencoj do devus esti celo de ĉiuj junularaj organizaĵoj, same kiel tio jam estas unu el la celoj de TEJO."

Interpretado maltaŭga solvo

La TEJO-representantoj havis eblecon reveni al la lingva problemo en unu el la komisionoj. Dum la konferenco fariĝis nome tiel evidente ke la elektita teknika solvo (interpretado inter kvar lingvoj) estas maltaŭga, ke la irititeco kreskis. Jen la maŝinaro malfunkciiĝis (la rusa kaj germana lingvoj estis aŭdeblaj sur la sama kanalo), jen la parolantoj estis tute nekompreneblaj ("La angla traduko ne funkcias!" kriis iu, dum islandano voĉlegis ion *anglalingve*, aŭ en lingvo, kiun li kredis esti angla), jen la tradukistoj ekzemple kiam oni tradukis en la rusa en la anglan nekompreneblis.

En unu el la komisionoj okazis sufiĉe longa diskuto pri la lingva problemo kiel barilo al la interkompreniĝo. La TEJO-anoj ricevis fortan subtenon de neesperantista norvega studento. Malgraŭ tiu diskuto, la raporto de la komisiono enhavis nenion pri lingvo. Ni faris skriban proponon pri ŝanĝo, eĉ dufoje, sed sen rezulto. Ni do fine decidis skribi protesti pri tio al la prezidantaro de la konferenco, kun la rezulto, ke la protesto aldoniĝas al la raporto de la komisiono. Tiu solvo estas eĉ pli bona ol se nia tre milda frazo estus akceptita.

Franko Luin

NI GRATULAS

BERTIL AKERBERG 60-JARA

Ĉu vi ricevas vian gazeton regule? Mi supozas ke vi ĉiam anoncas al SEF pri adresŝanĝo, kion vi povas fari senpage per karto ricevebla ĉe la poŝtoŝeĉejo.

Bertil Akerberg, i. a. estrarano de SEF, estas poŝtoŝeĉisto kaj la ĝusta persono organizi la distribuadon de La Espero. En la kelo de sia domo li havas vin ĉiujn sur ŝtalplakoj ordigitaj laŭ poŝtnumero. Tie li ankaŭ havas adresmaŝinon kaj stamplilon por mem skribi la adresplakojn.

Jen lia libertempa plezuro. Kaj vi regule ricevas vian gazeton. La 18 oktobro 1972 li estis 60-jara. Gratulon kaj dankon!

Salex

HUGO ANDERSSON 80-JARA

La 6-an de septembro 1972 Hugo Andersson, Stockholm, estis 80-jarulo. Li esperantistiĝis en 1932 kun edzino en Hofors. Tie ili fondis Esperanto-klubon en 1934, kiu efike laboris longan tempon. Eksterlandaj esperantistoj-prelegistoj ofte estis gastoj de Hofors Esperanto-Klubo tiutempe.

En la jaro 1942 ili transloĝis al Stockholm. Per Esperanto ili havas amikojn multloke en la mondo.

IMITINDA ARANGO

La loka grupo en Halmstad okazigis la 26—27 de aŭgusto en Falkenberg vere interesan kaj tre imitindan kurson kun prelegoj kaj lingvaj lecionoj. Kiel kursgvidantoj funkciis licea adjunkto Lennart Andreasson kaj ĉefinstruisto Olle Olsson.

Andreasson, ne estante esperantisto, faris tre longan, sed ne malpli fekundan, lecionon pri ĝenerala pedagogiko, por kursgvidantoj fakte vere instrua. Olle Olsson tuis la temon: Akuzativo en Esperanto! Li persiste emfazis ke tiu lingva problemo ne estas tiom komplika kiom oni ofte asertas. La kursanoj ricevis taskojn, kiujn ili grupe devis solvi, kaj en tiu grupa laboro evidentigis ke la partoprenantoj sukcesis pli bone ol atendite.

Vere akcentinda estas la bona kaj amikeca atmosfero kiu regis la tutan semajnofinon. Des pli ni nun aprobas la proponon, kiun distribuis la suda distrikto, ke simila arango okazu en la printempo 1973. Kial ne kaj printempe kaj aŭtune?

A Ln

La jubeliinto pasigas nun kun edzino Gunhild la grandparton de la someroj en bela regiono apud la idilia lago Gäsen norde de Orsa. Tie mi ofte estas gastoj.

H. F.

HÖG TID

för

OBS!

ALLA bör vara med i UEA.
Gör Er inbetalning NU!

UEA-AVGIFTER

Låt oss undvika påminnelser. Avgifterna för 1973:

MA — medlem med årsbok och tidn. "Esperanto"	kr 43:—
MJ — medlem med årsbok	kr 21:50
MA-K — Ungdomsmedlem (22—25 år) med årsbok, "Esperanto" och ungdomstidn. "Kontakto" (vid inbetalning meddela ålder samt att "Kontakto" önskas)	kr 43:—
MS — samma som MA, understödande medlem	kr 64:25
J-MJ — ungdomsmedlem under 22 år med årsbok	kr 10:75
J-MA — d:o med årsbok, tidn. "Esperanto" och ungdomstidn. "Kontakto"	kr 32:25
DM — "Dumviva medlem", betalar 20 MA-avgifter och är sedan ständigt UEA-medlem	kr 860:—

Avgifterna insättes å postgirokonto 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, Specialkonto, Malmö). Angiv å talongen vad inbetalningen avser.

Sverige bör fortfarande ha fler MS-medlemmar. Undersök möjligheten kunna ansluta Er till UEA som MS-medlem. Det finns fler som kan bli Dumvivaj Medlemmar.

Ingen bör vara utan information (årsbok och tidning) från världsorganisationen. Anslut Er som direkta medlemmar i UEA. Men sänd helst Er inbetalning nu. Då besparar Ni oss mycket arbete.

Svenska Esperanto-Förbundet

DEZIRAS KORESPONDI

50-jara profesoro kaj tradukisto de modernaj lingvoj serĉas geamikojn en Svedujo por korespondi kaj renkonti. Interesiĝas i. a. pri muziko, literaturo, lingvistiko, belaj artoj, florkulturo, fotografado, danco, motorsportoj. Mia hejmo en Francujo estas ĉiam malferma por miaj geamikoj.

S-ro Jacques Berger, 4. Rue de la Malcense, 59-TOURCOING, Francujo.

ESPERANTO-MUZEO EN RUMANIO

La Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato alvokas la esperantistaron tutmondan sendi al la malsupra adreso diversajn librojn, broŝurojn, gazetojn, afiŝojn, fotografaĵojn, poŝtkartojn, E-poŝtmarkojn, glumarkojn k. a.

Nia adreso "Esperanto" SFINTU GHEORGHE, Căsuța Postală 10 Jud. Covasna, Rumanio.

Interŝanĝas **PUPOJN** en originala nacia kostumo, **memorobjektojn** kun nacia karaktero el ĉiuj landoj: Jenő Zágoni, SFINTU GHEORGHE, Cas. post. 10., Jud. Covasna, Rumanio.

16a INTERNACIA SEMINARIO DE GERMANA ESPERANTO- JUNULARO

okazos 27.12 1972—3.1 1973 en Darmstadt.

Temo: La manipolata homo. La temon pritraktos ĉirkaŭ 8 laborgrupoj po ne pli ol 10 personoj.

Informoj kaj aliĝoj: Ingrid Maier, Hauptstrasse 246, D-69 Heidelberg, Germana Federacia Respubliko.

El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro £ 0.50 Can.\$ 2.00 Sv. Krj. 7:—
2 jaroj £ 0.75 Can.\$ 3.00 Sv. Krj. 10: 50
3 jaroj £ 1.00 Can.\$ 4.00 Sv. Krj. 14:—

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Ĉiu abonanto por la jaro 1973, kiu faros
abonon antaŭ la 31-a de la venonta januaro,
ricevos belan esperantan bild-kalendaron.

Sveda peranto:
Esperantoförlaget
Fack
200 42 MALMO 7
Poŝtgiro 578-5



Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

58-a
UNIVERSALA KONGRESO
de Esperanto



28 juli—4 augusti 1973

BELGRAD, JUGOSLAVIEN

blir platsen för esperantovärldskongressen 1973. Anmäl Eder redan nu till kongressen. Svensk förmedlare (Peranto) av kongressanmälningar är som vanligt endast Svenska Esperanto-Förbundet.

Anmälningsblanketter erhålles efter rekvisition hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040/652 09).

Anmälan. Anmälningsblanketter och sedermera även beställningar av logi och utfärder skall insändas till samma adress, s-ino Andrén, Malmö, och icke till Holland eller Jugoslavien.

Likvid. Avgifterna insättes på postgirokonto 14 74 29-5. Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö.

KONGRESSAVGIFTER

(Obs! Svenska kronor)

	Till 31/12 1972	Till 31/3 1973	Till 20/6 1973
1. Kongresano, ne membro individua de UEA	136:—	150:—	163:—
2. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro (MJ)	114:—	127:—	141:—
3. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	91:—	105:—	118:—
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	96:—	106:—	115:—
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorioj 2 aŭ 3	80:—	88:—	96:—
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	42:—	46:—	50:—
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara	69:—	76:—	82:—
8. Blindul(in)o	55:—	61:—	66:—

Var vänlig skriv namn etc. tydligt på anmälningsblanketten men ej några avgifter (det gör SEF). Meddela i stället avgifterna tydligt på postgirotalongen eller helst i särskilt brev tillsammans med anmälningsblanketten.

Rabatt får som synes direkta medlemmar i UEA. Det lönar sig alltså att bli direkt medlem. Ni vinner många fördelar. Gör allvar av att anmäla Er som direkt medlem av UEA.

Gåvor: Som vanligt mottager SEF och vidarebefordrar gåvor till Litteraturfonden (tävlingspremier), Blindfonden (de blindas kongress), Adopta Kaso (för dem som ej får betala från eget land) och Adoptaj Gepatroj (för barnkongressen). Givares namn publiceras. Svenskarna bör observera dessa fonder, även om Ni själva ej skall resa till kongressen. Lämna gärna Ert bidrag.

SEF

La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enskede.

Cefredaktoro: Ake Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm.

Prezo de jarabono: 20 sv. kr. (postčeka konto 20 12-3).

Prezo de anoncoj: 1/1 paĝo 180:—, 1/2 = 90:—,

1/3 = 60:—, 1/6 = 30:—, 1/12 = 15:—.

Milimetra prezo 40 öre.

Korespondanonco: 25-vorta = 4:—, 50-vorta = 8:—.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO

Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.
114 44 Stockholm



Girkonto: 20 12-3

Telefona: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 25 kr., junuloj 7 kr.
familia membro sen gazeto 5 kr.

ESTRARO

Prezidanto: Jan Strönne, Amralsgatan 36, 211 55 Malmö.
Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr 8. g.,
112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Kasisto: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,
122 32 Enskede. Tel. 08/49 80 24.

Bertil Akerberg, Lällsvägen 39, 126 57 Hägersten.
Tel. 08/46 29 95.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.
Tel. 08/41 78 74.

Franco Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Tomas Jansson, Sturegatan 12 B, 752 23 Uppsala.
Tel. 018/11 73 09.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B



Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkrede 10.00—11.00 jaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578-5.



Administranto: Anna-Greta Strönne

Tel. hejma 040/12 92 11

Prez. Sven Sjöblom